

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**Novaj Honoraj
Membroj**




**Rikolto de
someraj raportoj**



**Lingva arto
omaĝas al Auld
kaj Boulton**



Neves: Amoroj



La klubanoj de tutmondiĝo

Vi trovos...

161 **Malferme**

Ne drivi, sed navigi memfide

István Ertl

162 **SHAKESPEARE EN HAMBURGAJA SKATOLO**

Humphrey
Tonkin



164 **Someraj aranĝoj**

Naŭdekjara movado kongresis

István Gulyás

Tondra roko kaj rekorda protokolo

László Szilvási

Tem' inspira, Afriko premiera

Rob Moerbeek kaj Jan Bemelmans

Premio pri *Songô*

Bruno Masala

Lerni regadon de konfliktoj

GBEGLO Koffi

166 **Komitato kaj Estraro**

Pliaj perantoj portu kreskon

Osmo Buller

168 **Belantaj Konkursoj**

Kvindeka fojo, alta kvalito

Amoroj

Gonçalo Neves

170 **Honoraj Membroj**

Merita kvinopo honorita

171 **Lingopolitiko**

Fiaska dulingveco?

Jouko Lindstedt

172 **Recenzoj**

Carlo Minnaja pri
Lingva arto kaj 75 jaroj

Sabira Ståhlberg pri
Noveloj el antikva Ĉinio

Spomenka Štimec pri
Luĉifero

Karina kaj Stefan MacGill pri
Infaneske



173 **Navige tra TTT-paĝoj**

175 **Laste aperis**

176 **Furoraĵoj de la Kongresa Libroservo**

Kaj plue...

177 **Loke - Foliume**

178 **Influe Oficiala informilo**

179 **Persone - Fake**

180 **Forpasoj**

La kovrilo: La selekta klubo de feliĉuloj.

Dekstra paĝo: Berolina Linke Wade dancas en la Nacia Vespero. (UEA / F. L. Veuthey)

ESPERANTO

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establiĝis kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: István Ertl.
Grafiko: Francisco L. Veuthey.
Aperas en ĉiu monato krom aŭgusto.
Redaktofino: la 10-a de ĉiu monato.
Legata en 115 landoj.
Voĉlegata por vidhandikapitoj.
Abonprezo: varias laŭlande (NLG 66; USD 36; DEM 58; JPY 4300 ktp); informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas 5,50 gld.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 2100, 1/2 p. 1150, 1/4 p. 630, 1/8 p. 350, 1/16 p. 190.
Movada rabato 50%. Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.
Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-konto: 37 89 64 (Den Haag).
Kreditkartoj:

Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Telefono: +31-10-436-1044.
Telefakso: +31-10-436-1751.
Retpoŝto: uea@inter.nl.net.
Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.
Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.
Direktoro de la Centra Oficejo: Pasquale Zapelli.



NE DRIVI, SED NAVIGI MEMFIDELE

Spertaj kongresantoj bone scias ke semajno de Universala Kongreso estas sperto altagrade fizika: multa marŝado, hastaj manĝoj, dormo malsufiĉa, perdataj kilogramoj. Same en la Berlina UK.

Sed oni tiel streĉas sin por kompenso de gajnoj emociaj kaj intelektaj. Kaj en Berlino ĉi tiuj multas, eĉ superkutime. Kontribuoj pri la ide-genera kongresa temo, diskutoj en la dua Nitobe-simpozio, esperantologiaj prelegoj kaj terminologiaj precizigoj, komitataj vortoskermoj, kongresa rezolucio preter pia dezir-esprimo: ĉio ĉi kaj multo pli zorgis pri tiom riĉa kongresa semajno ke nia pasinta numero ne povis, kaj eĉ la nuna ankoraŭ ne povas, ampleksi ĉiom kun protokola fidelo. Por ke la bobeno ne disruliĝu, ni kaptu la plej gravan fadenon.

Ne surprizus min se post jardekoj la movad-historiistoj juĝus ke la Berlina estis la UK kies temo plej konvene laŭis ĉeffluon de la samtempa monda ideado. Tutmond-iĝo kaj -eco ja estas ne nur vortoj paseme modaj, sed esprimo de kerna dilemo kiun la esperantistaro devas maleviti, kaj kiu, eĉ, decide influos ĝian destinton post la sojleca jaro 2000.

Ĉar kion fari, se en la mondo ekestas "internacia klaso de esperantistoj sen Esperanto" (H. Tonkin dorse de ĉi tiu paĝo)? Kiel reagi se la mondo nun sendanke preterzumas nin, lingvan apartularon kies movadaj geavoj pioniris la interkomunikan idealon kiun ĝi nun

fervore realigadas? Kiel strategii por ne sinki aŭ drivi, sed navigi memfidele sur la ondoj de tutmondiĝo?

Jen kruda demando sintruda. Al ĝi konvenus ne respondo, nur respondaro, tiom pli ke respondo sol-prava kutimas esti ne nur danĝera, sed ankaŭ malefika.

Unu afero ŝajnas certa: la esperantistaro devas nun, pli ol iam ajn, alfronti sian denaskan ambiguan: tion ke ĝi duvizaĝas kiel universalismo (ofte ema forĵeti ĉion apartigan) kaj kiel (a)partismo (ofte strebanta komuniki, per universala esprimilo, sian apartecon anstataŭ partecon). Du fluoj paralelaj, eĉ se en miniatūra mezuro, kun la tutmonda unuecigo (foje rul-premila) unuflanke kaj kun lokaj partikularismoj (foje najbar-buĉaj) aliflanke.

La potencaj kohortoj de unuismo kaj de lokismo ne bezonas nin kiel aliancanojn; sed ja ni mem bezonas, ni ŝuldas al ni determini kie, kun kiuj ni staru.

Ni staru ĉeŝultre de tiuj kiuj respektas aliajn ĉar ili sin respektas. Kiuj konservas zorge, sed ne kun blinda pio. Kiuj lernas asidue, instruas sentrude, akceptas malvenkojn. Kiuj toleras eĉ netoleremon sed firmas pri rajto je digno. Kiuj survojas, eĉ stumble, kun volo al celo. Por kiuj "homaro" estas plie homo ol aro.

Nur se kun tiuj ni staros, ni entute staros, nur tiam eltenos. La avoj nin benos.

István Ertl



Shakespeare en hamburga skatolo

En prelego pri la kongresa temo, Humphrey Tonkin prilumis facetojn eble malpli konatajn de tutmondiĝo.

Kio diferencigas la nunan epokon de tutmondiĝo disde la industria epoko de la 19-a jarcento, estas la skalo: en multaj rilatoj la analizo de Marx de antaŭ 150 jaroj estas egale aplikebla (aŭ neaplikebla, pro la konataj limigoj de liaj teorioj) al la hodiaŭa mondo. “Kio novas hodiaŭ” skribas Thomas Friedman, “estas la grado kaj intenso laŭ kiu oni kunligas la mondon en unusolan tutmondigitan merkatejon. Kio ankaŭ novas estas simple la nombro da homoj kaj landoj kiuj povas partopreni tiun procedon kaj senti ĝian efikon.”

La antaŭa epoko de tutmondiĝo, la industria, dependis ĉefe de falo en la kostoj de transportado; poste aldoniĝis telegrafio kaj telefonio. La nuna epoko dependas de falo en la kostoj de informoj; ni aldonu la aeran transportadon. La antaŭa epoko produktis novan, pli vastan mezan klason — kiu, profitante el la novaj transportaj eblecoj kaj sia nova edukado, kreis la novajn grandurbojn, lernis Esperanton, formis novan, parte internaciigitan kulturon. La nuna epoko rapide vastigas la nombron de homoj kiuj povas interrilatiĝi trans grandaj distancoj, kaj kiuj iom post iom formas novan internacian klason.

La baza principo estas simpla: se oni kreas pli da riĉeco, kaj se oni havas demokratian sistemon, en kiu la akiro de voĉoj dependas de vasta distribuo de la riĉaĵoj, la rezulto estos pligrandigo de la membraro de la klubo — des pli pro tio ke tiuj membroj investos siajn nove akiritajn rimedojn en la kreadon de ankoraŭ pli da riĉeco.

Tiu internacia klaso havas siajn komunajn interesojn, semiotikon kaj simbolaĵajn sistemojn. Kiam Esperanto



ekestis fine de la pasinta jarcento, iuj profetis ĝian diskolapson pro manko de komunaj valoroj. Tio ne okazis: la E-parolantoj trovis inter si multon komunan — kaj tio etendiĝis eĉ al kreo de riĉa tutmonda literaturo.

Hodiaŭ kreiĝas internacia klaso de esperantistoj sen Esperanto — homoj kiuj legas la samajn verkojn (ne nepre samlingve), spektas la samajn filmojn, kolektas novaĵojn el la samaj fontoj, studas la samajn temojn, kondukas la samajn aŭtojn. Unu el la grandaj demandoj por ni esperantistoj estas kiel rilati al tiu internacia kulturo kaj precipe al tiu internacia literaturo kiun ni emas ignori.

La internacia kulturo havas diversajn aspektojn. Ĝi plej videble manifestiĝas en la internacia komerco kaj financo — en la normoj kaj ĝenroj kiuj rapide ekestas en la socia interago de tiuj kiuj laboras en tutmondigita medio. Sed normiĝas kaj konverĝas ankaŭ la merkatumo de produktoj, la normoj kaj praktikoj de aĉetado kaj vendoj, la vestoj, la manieroj kaj la enhavo de edukado de infanoj, kaj amaso da aliaj aferoj. Ju pli tiu tutmondigita klaso kondukas kiel tia, des pli normiĝas la medio en kiu ĝi funkcias. Tiu norma konduto portas kun si prestiĝon kaj financajn avantaĝojn — kio siavice plifortigas ĝin.



La tutmondiĝo-klubo

Bedaŭrinde, membreco en la klubo — ĉu tiuj 2% kiuj havas (laŭ la kalkuloj) facilan aliron al komputiloj, ĉu tiuj 20% kiuj esence ĝuas la avantaĝojn de la nova prospero — facile kreas la iluzion ke la tuta mondo efektive membras. Kiel ofte ni e-istoj plendas pri tiuj kiuj deklaras: “La tuta mondo parolas la anglan!” Ili devus diri, maksimume: “ĉiuj homoj kiuj gravas, ĉiuj kiel ni, parolas la anglan.” Same pri la tutmondiĝo-klubo: restas la problemo de nemembroj — la vastaj homtavoloj kiuj restas ekster la teknologio, sen rimedoj por multe profiti el la nova mondordo. Dum la klubamembronombro kreskas, eksplode kreskas la monda loĝantaro, ĉefe inter la malriĉuloj, la nemembroj.

Serĉi alian vojon

Se tutmondiĝo estas nehaltigebla procedo (kaj mi emas tiel kredi), la demando do estas: kiel adaptiĝi al tutmonda sistemo, utiligante ĝiajn avantaĝojn kaj kreante tutmondan etikon,

kaj samtempe konservi sian individuecon? Ĉu eblas konservi siajn apartaĵojn kaj tradiciojn, siajn kredojn, sen fariĝi Norda Koreio aŭ Mjanmaro? Ĉu eblas kombini materialan prosperon kaj homajn valorojn?

Ni bone scias ke nia nova mondo kunfandas kaj homogenigas la terglobon je konsterna rapideco. Ĝiaj kulturaj produktoj spegulas la profilon de la monda kapitalo: temas pri mondo dominata de McDonalds, Disney, Coca-Cola. Ĝuste ni, kiuj estas membroj de tiu elito kiu ne nur uzas tiujn produktojn sed ankaŭ posedas la akciojn, ĝin denuncas. Efektive indas emfazi ke tiu tutmonda kulturo konsistas el pluraj subkulturoj, el kiuj la transnacia kritika intelektularo estas unu el la plej gravaj: se merkatisma triumfas, ĝi trenas kun si universitatanojn kaj aliajn intelektajn konsumantojn, el la tuta mondo. Se McDonalds, Disney kaj ties kulturaj produktoj regas, kaj se ia senradikeco fariĝis socia normo, ni memoru ke oni ankaŭ, pro tiu ĉi tutmondiĝo, povas viziti la limojn de la homa scio per sia komputilo. Kiam la Zamenhofa koro batas maltrankvile, eblas nun akiri novan per moderna kirurgio; oni povas havi je sia dispono la plej profundajn verkojn de la muziko per kompaktaĵaj diskoj.

Oni povus eĉ diri ke en ĉiu hamburgaĵa skatolo de McDonalds kuŝas virtuala senpaga donaco, kiu nomiĝas Beethoven, bona gimnastikejo, Shakespeare-verkaro, injekto kontraŭ hepatito, aŭ semajno en Florenco — aferoj malfacile ĝueblaj pli frue. Unu paradokso de la tutmondiĝo estas ke la ŝajna formuelado de sendependa pensado per la amasproduktoj ankaŭ nutras nian homan deziron lerni pri la mondo kaj sperti ĝin, ĝis maksimumo. Kontraŭantoj de nia nova mondo memoru ke izolo kaj evito de eksteraj influoj ne nepre kondukas al pensoj pli altaj ol McDonalds aŭ vivprincipoj socie pli akcepteblaj ol Disney.

Konservi diversecon

Tradicie la idealo de Esperanto apogas la ideon ke pli da homa interkompreniĝo super la lingvaj baroj ebligas konstruon de pli bona mondo. La fruaj esperantistoj ne multe okupiĝis pri la enhavo de tiu interkompreniĝo, nek pri ĝia ekvilibro, sed nur pri tio ke ĝi okazu.

Hodiaŭ, tamen, ni ekkomprenas ke komunikado ne per si mem konstruas pacon. Komunikado unudirekta, laŭ kiu iuj ŝtatoj, interesoj aŭ ekonomiaj klasoj disŝutas siajn kulturproduktojn sur aliajn, ne sufiĉas. En tiu modelo dudirekta signifas nur foj-fojan konsultadon de la konsumantoj pri tio kiun venenon ili englutu. Ni ankaŭ komprenas ke komunikado kiu baziĝas sur forsuĉo de informoj por analizo kaj utiligo en socia kaj komerca manipulado, same ne adekvatas. Gravus ne nur ke ia komunikado okazu, sed ke ĝi estu bazita sur reciprokeco kaj komunaj interesoj.

Tiuj komunaj interesoj inkluzivas ĝuste la nekomunecon. Jam en sia Londona parolado (1907) Zamenhof atentigis, per siaj rimarkoj pri patriotismo, ke interkompreniĝo kaj homogeniĝo ne estas sama afero. Esperanto, kiel ni ĉiuj bone scias, povas ŝirmi la malgrandajn lingvojn kaj kulturojn kontraŭ la grandaj, samtempe garantianta ke pri esencaj aferoj de la homa estonteco oni povu interkomunikiĝi sur neŭtrala bazo.

Paco kaj Esperanto

Se temas pri paco, V. Benczik diris ke “paco ĉiam estis la ĉefa deziro de la homoj.” [Vidu sep., p. 142] Mi ne tiel optimizmas kiel li. Se paco signifas sidi komforte ombre de liberaj merkatoj, akcepti ties ideologion kaj labori produktive por ties realigo, tiam jes, la plejparto de la homoj en nia malekvilibra mondo momente deziras pacon. Sed tiu kiu, pro deziro gardi la propran kulturon aŭ pro malpli noblaj motivoj, minacas tiun prosperon, rapide lernos ke paco ne estas la ĉefa deziro de la gvidantoj de tiu merkata klubo, aŭ eĉ de ĝiaj simplaj membroj: unue gravas la materia prospero. Tiu deziro al materia prospero kaj la konkurenco kiu akompanas ĝin, distordas ĉiam pli kaj pli emfaze la modernan interkonsenton pri la bazaj principoj de la internacia vivo.

Tutmondiĝo, je kiu ajn kosto, ne produktos aŭ garantios pacon. Konata komentanto pri komercaj praktikoj, Peter F. Drucker, kvankam konvinkita ke integrita internacia financa sistemo malhelpas militon kaj helpas konservi pacon, tamen atentigas: “Kiam ajn en la pasintaj ducent jaroj politikaj pasioj kaj naciŝtata politiko koliziis kun ekonomia racio, venkis la politikaj pasioj kaj la naciŝtata politiko.”

☞ daŭrigo sur p. 167

Naŭdekjara movado kongresis

István Gulyás - Hungario

Kvaran fojon francaj fervojistaj esperantistoj gastigis IFEF-kongreson: la 51-an (Le Mans, 8-15 majo). Entute 285 personoj aliĝis, sed nur 227 el 21 landoj partoprenis: la diferencon kaŭzis i.a. la jugoslavia milito.

En la inaŭguro salutis reprezentantoj de urbaj kaj fervojaj organizaĵoj, i.a. (kun perfekta Esperanta prononco) la prezidanto de Fervojista Kultura kaj Libertempa Organizaĵo (FISAIC), Gilbert Schmit, kaj Petro Chrdle, UEA-estrarano pri faka agado.

La Komitato decidis ke la 52-a kongreso okazos en 2000 en Budapeŝto; la 53-a (en 2001) en la ĉeĥa urbo Tábor. Honoraj Membroj estis nomumitaj

Gernot Ritterspach (postmorte) kaj Otto Rösemann (ambaŭ el Germanio).

En la kunsidoj de la Faka Komisiono oni i.a. prezentis la 8-an numeron de *Fervojfakaj Kajeroj*, kaj ĝia Terminara Sekcio ekzamenis novajn esprimojn por la tria eldono de *RailLexic*, la fakterminaro de Internacia Fervoja Unio (UIC). Pri ĝi nun atendas pluaj taskoj:

- kolekti novajn fakesprimojn (jam ni havas 12 689);
- traduki la difinojn pri la terminoj;

• laŭ la difinoj reekzameni la terminojn, kaj harmoniigi ilin kun la nocioj.

Georges Wallerand (ĝen. sekretario de FISAIC, vicprezidanto de Franca Fervojista E-Asocio) prelegis pri la entrepreno-komitatoj ĉe la franca fervojo. Ses alilandaj prelegoj portis aktualaĵojn.

Por la 90-jariĝo de la fervojista E-movado, aperis dum la kongreso broŝuro pri la historio de IFEF en 1984-99, kompletige al *Historio de IFEF 1909-1984* — ambaŭ kompilitaj de Joachim Giessner, honora prezidanto de IFEF.

Dum la tuttaga ekskurso ni haltis ĉe Kastelo Grésillon en la urbeto Baugé. La belega kaj granda kastelo funkcias kiel kultura Esperanto-domo, kun kursoj, prelegoj, teatraj spektakloj kaj aliaj kulturaranĝoj por esperantistoj. Bedaŭrinde, ĝiaj dormoĉambroj nun ne estas uzebaj, pro malpermeso de sekurkomisiono. ★

Tondra roko kaj rekorda protokolo

"Neforgesebla, surpriza, bonega, vera oro!" — aŭdiĝis komentoj pri Amplifiki-konzerto kaj la tuta 55-a IJK (9-16 aŭg., Veszprém, Hungario).

Elstare agrablan semajnon havis la ĉ. 500 partoprenantoj. Spontana koncerto de Amplifiki + JoMo, suneklipso, riĉa programo, ekskursoj, balo, hektolitro da senpaga vino kreis eksterordinaran etoson. "IJK en Veszprém: vera oro!" — oni vortludis pri la tri ĉeforganizantoj: Vera Acsádi (programeroj) kaj gefratoj Golden, Lariko kaj Alko (kunagordado kaj administrado).

Improvisa koncerto de la fama bando Amplifiki igis nostalgiaj tiujn kiuj aŭdis ilian unuan publikan prezenton, same en Hungario, en la legenda Debrecena IJK (1983). Mike kaj Bertilo, membroj de la iama Amplifiki, produktis freneze bonan koncerton kaj etoson! Homoj kriis, aplaudis, kune kantis ĉiujn ŝatatajn kantojn: *Sola*, *Bela knabin'*, *ISO*, *Tute ne gravas ktp.*



La dumkongresa plena suneklipso ne kaŭzis okulproblemojn. La streson de la tagmeza noktiĝo duminuta sukcese solvis posta komuna kantado.

Planita rekta elsendo ret-radia kaj

televida ne realigeblis, sed ĉiam plenis Interret-ĉambro kun ĉ. 20 komputiloj.

Pro lastmonata lokoŝanĝo la IJK okazis ne apud la lago Balaton, sed la organizantoj ja venigis la plaĝon al la

kongresejo: invitita fajrobrigado ŝprucigis akvo-kanone en la solena inaŭguro; akvopistolano batalegon la kongresanoj mem aranĝis antaŭ la kongresejo.

Aparte popularaj en la bunta pro-

Tem' inspira, Afriko premiera

Unu el la plej sukcesaj blindulkongresoj de la jarmilo – opinias niaj raportantoj pri la 65-a IKBE.

Premio pro *Sonĝo*

Pri "Mono kaj civilizo" temis la Internacia E-Konferenco de OSIEK (17-23 jul., Metz, Francio).

La nova prezidanto de OSIEK estas Mantha Christou (Grekio), direktoro de la internaciaj rilatoj en la Banko de Grekio. Komunikema, kulturŝatanto, ŝi estas membro de OSIEK ekde la komenco. Eugène de Zilah plu laboras kiel vicprezidanto.

La 10-a premio de OSIEK estis atribuita al la 56-jara ĉino XIE Yuming, membro de la Akademio, kiu tradukis unu el la plej gravaj klasikaj beletraĵoj de la ĉina literaturo, *La Rugdoma Sonĝo* (Ĉina E-Eldonejo). Tiu romano, pri la socia kaj spirita vojado de juna nobelo en la 17-a jarcento, estas escepta pro multaj kialoj: amplekso (3x600 paĝoj, aŭtobiograficeco, diverseco de interpretoj ktp).

La sekva konferenco okazos de 15 ĝis 21 jul. 2000 en Motovun (Istrio, Kroatio), kun la temo "Multkultureco, multlingveco kaj kunvivado".

Bruno Masala, laŭ La Ondo de Esperanto

En la 65-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj (Berlino, 25-31 jul.) partoprenis 102 vidhandikapitoj kaj akompanantoj el 18 landoj de 4 kontinentoj. Unuafoje ĉeestis afrika blindulo: Lazare Hounnake alvenis tute sola el Togolando. Amerikon reprezentis Jean Sorel (Kanado), Azion Natalja Kasymova (Taĝikio). La kongrestemo "Esperanto kaj kulturo" inspiris i.a. altnivelajn prelegojn de LKK-prezidanto Theodor



IKBE-partoprenanto Jean Sorel el Kanado

Rob Moerbeek

Speckmann pri Goethe kaj Fontane, Nadja Ĵukova pri Puŝkin kaj Otto Prytz pri la norvega aŭtoro Falkberget; krome muzikon de krimea blindulgrupo. Fakaj temoj rilatis la kultur-servon de la Finna Blindulligo (Raimo Tanskanen) kaj la influon de la sociala kaso de Eŭropa Unio al dungado de blinduloj (Arvo Karvinen). Resume: unu el la plej sukcesaj blindul-kongresoj de la jarmilo. La venontan (en 2000) organizos verŝajne bulgaraj membroj en Plovdiv.

Laŭ raporto de Rob Moerbeek kaj Jan Bemelmans en Pordego al Kongreso

Lerni regadon de konfliktoj

De 7 ĝis 13 aŭg. okazis en Karlovy Vary (Ĉeĥio) la 33-a ILEI-konferenco. Ĝin partoprenis 52 esperantistoj el 22 landoj de 5 kontinentoj.

Konferencanojn kiuj deziris ion lerni dum la aranĝo, klerigis prelegoj pri "Instruo de la lingvo kaj gramatiko" (Geraldo Mattos), "Projekto Interkulturo" (Mauro La Torre, la prezidanto de ILEI), "Netradicia lernolibro de Esperanto" (Petro Chrdle), "Antonimoj kaj sinonimoj en Esperanto" (Lawrence Mee), "Pasporto al la Tuta Mondo" (Lucie Harmon) kaj "Uzo de vortaroj en la instruado" (Ilona Koutny).

La trejnaj sesioj "Edukado al paco" (Mireille Grosjean) kaj "La fremdeco en ni: ekkoni kaj prilabori la antaŭjuĝojn" (Sabine Trenner) ebligis lerni pri regado de konfliktoj. Márta Kovács trejnensis pri "Komputilaj helpoj al instruado". Neforgesindas la prezentoj de Ton Verwoerd pri instruhelpiloj kaj de Mihai Trifoi ("Kiel naskiĝis nova sperto?").

Okazis C-seminario pri la Cseh-metodo: en ekzamenoj B kaj C sukcesis ĉiuj 3 resp. 4 kandidatoj.

La komitato kaj la estraro de ILEI preskaŭ ĉiutage kunsidis por pripensi la evoluigon de la asocio. Akcepto de ILEI-sekcio en Togolando kaj elekto de nova kasisto estas du el la decidoj faritaj. Nome, post pli ol 17 jaroj da laboro por ILEI, Bertil Andréasson retiriĝis, cedante la lokon al Boo Mee Kim-Lindblom.

En la konferenca rezolucio precipa punkto temas pri "regado de konfliktoj": ILEI proponas ke estu enkondukita en lernejojn lernado pri tio.

Kultura vespero kaj loterio ebligis distron post longaj horoj da laborado. Ĉi tiu enspezis 3500 ĉeĥajn kronojn (ĉ. € 100) al la kaso de ILEI.

La konferenca partopreno de esperantistoj el ĉiuj kvin kontinentoj atestas ke ILEI estas vere tutmonda organizaĵo, kaj samtempe devigas la gvidantojn de la ligo vere kunlabori kun ĉiuj tra la mondo kaj provi demokratiigi la instruadon de Esperanto.

Laŭ raporto de GREGLO Koffi

gramo estis tutsemajna psikologia trejnado, kavalira konkurso, kurso pri glitflugado kaj "afrodanca vespero".

Dum tuttaga ekskurso al Budapeŝto, post E-lingva saluto el la stacidoma laŭtparolilo, oni i.a. partoprenis la inaŭguron de nova Zamenhof-monumento en la ĉefurba Esperanto-Parko.

Protokolo de la komitat-kunsido estis rete dissendita 10 horojn post la fermo de la kunsido — certe senprecedenca rapideco en la historio de la Internaciaj Junularaj Kongresoj.

Laŭ raporto de László Szilvási

ilei

Krom agrablaj taskoj – kiel akcepto de aliĝpetoj – la Komitato devis en Berlino ankaŭ serĉi rimedojn kontraŭ zorgigaj fenomenoj.

Entute 65 komitatanoj aŭ rajtigitaj anstataŭantoj el la 78 partoprenis en la Berlinaj kunsidoj de la supera organo de UEA. Plej malmulte (47) ili nombris en la unua plenkunsido la tagon antaŭ la inaŭguro, ĉar ne ĉiuj atingis la kongresurbon ĝis tiam. En la lasta kunsido, vendredon, anonciĝis 59 komitatanoj, inkluzive de la tiutage alelektitaj komitatanoj C, TAKEUTI Yosikazu (Japanio) kaj Flory Witdoeck (Belgio).

Pli ol la nombro, gravis la vigeleco de la debatoj. Se la komitatanoj ne estus samtempe aktivuloj de fakaj k.a. asocioj aŭ akademianoj aŭ kompetentuloj plej diversloke bezonataj, aŭ ne uzus sian rajton ekskursi almenaŭ duontagon, en Berlino ili estus povintaj debati multe pli ol la laŭ-

Pliaj perantoj portu kreskon

Osmo Buller




La estraranoj (dorse) vid-al-vid al la cetero de la Komitato en la ronda Salono Hodler. Kun Tacuo Hugiimoto (supre) la Estraro iĝis kvarkontinenta sepopo.

**VIZITU VIAN PROPAN DOMON ĈE
NIEUWE BINNENWEG 176 EN ROTTERDAMO DUM**

11^A MALFERMA TAGO

sabaton la 27-an de novembro 1999 (10h00 - 17h00)



★ En la libroservo ĉio
rabatita je 10%

★ Bazaro de e-aĵoj

**Speciala gasto:
HUMPHREY
TONKIN**



- ★ Senpaga loterio
- ★ Senhala prezento de E-filmoj
- ★ Kafo kaj teo senpage servataj




**MULTKOLORA GLUMARKO IGAS VIAJN
KOVERTOJN PARTOPRENI EN KAMPANJO 2000!**

Prezo de folio (12 glumarkoj): € 1,35.

Triona rabato ekde 3 folioj.

POR LERNI KAJ ARGUMENTI

Ĉu la lingvopolitiko de internaciaj organizaĵoj utilas nur por simbolaj politikaj celoj? Ĉu aktualaj modeloj de plurlingva demokratio efektive diskriminacias? Kian rolon ludu lokaj lingvoj en la solvado de mondaj problemoj? Kion eblas lerni el la spertoj pri Esperanto? Ĉiu kontribuado en la originala lingvo (angla, franca aŭ Esperanto), kun resumo en ĉiuj tri lingvoj. La angla teksto de la pionira raporto "Esperanto kaj la lingva demando ĉe Ligo de Nacioj" de NITIBE Inazō estas unufoje publikigita ĉi-libre.



AL LINGVA DEMOKRATIO / TOWARDS LINGUISTIC DEMOCRACY / VERS LA DÉMOCRATIE LINGUISTIQUE. Aktoj de la Nitobe-Simpozio, Prago, 1996. Mark Fettes kaj Suzanne Bolduc (red.). Rotterdam: UEA, 1998. 212p. ISBN 92 9017 054 9. 24cm. Prezo: €10,20.



Kongresa Foto-Servo / Rainos Knapp

Ankaŭ la ĝenerala malkresko de la membraro maltrankviligis la komitatanojn. Dum la traktado de la Estrara Raporto pri la agado en 1998 ankaŭ voĉoj el la publiko aliĝis al la diskuto. Flanke de la CO oni forte kritikis la nunan sistemon de oficialaj perantoj kaj pledis por liberigo de la kotizmerkato. La Estraro formale akceptis ĝin jam antaŭ jaroj, sed ĝia pli vasta aplikado estis prokrastita pro rezisto de landaj asocioj, kiuj nun funkcias kiel perantoj kaj sekve iom enspezas per la makleraĵo kiun UEA pagas por ĉiu perita kotizo. Sufiĉe multaj komitatanoj tamen apogis la intencon de la CO nomumi pliajn perantojn en landoj kie estas potencialo por kreskigi la individuan membraron.

Kresko per Kartvelio kaj Kostariko

La nombro de landaj asocioj de UEA kreskis al 62 per la akcepto de la aliĝpetoj de Kartvelia kaj Kostarika E-Asocioj. Pro formala manko la peto de Honkonga E-Asocio devas atendi ĝis la Tel-Aviva UK, dum la malnovaj petoj de la E-asocioj de Katalunio kaj Serba Respubliko restos nesolvebla problemo tiom longe kiom oni strikte aplikos la principon “unu asocio en unu regno”.

Neniu faka asocio petis aliĝon. Statuston de kunlaboranto petis Alianco Universala, sed ne sukcesis konvinki la Komitaton pri siaj organiza solideco kaj internacieco.

Kiel jam de kelkaj jaroj, financaj aferoj ne voris tre multan tempon. La plej interesa decido estis tiu pri la baza kotizo (MA por Nederlando) por 2000. Unuafoje ĝi estis fiksita en eŭroj: € 48. Ĝi egalas al 105,78 gld. Laŭ la nederlanda inflacio oni estus devinta plialtigi la nunan kotizon (105 gld.) per 2,50 gld., t.e. al € 49, sed laŭ la rekomendo de la Estraro oni rezignis pri unu eŭro, esperante ke ankaŭ tio estos briko por la membrovarba kampanjo.

En la lasta tago la elektokomisiono transdonis al la Komitato proponon pligrandigi la nunan 6-kapan Estraron per alekto de plia membro, Tacuo Huĝimoto el Japanio. Tion la Komitato volonte akceptis. Por prepari la elekton (en 2001) de la venonta Estraro oni nomumis novan elektokomisionon kun Roland Lindblom, Claude Nourmont kaj SYŌZI Keiko kiel membroj.

Kongreso en 2002 en Brazilo

La estraranoj kunsidis plurfoje dum la semajno. Ili ĉefe devis okupiĝi pri kunordigo de sia agado en Berlino, sed ankaŭ estontaj UK-oj troviĝis en ilia tagordo. La konkurso inter la belga Kortrijk kaj la brazila Fortaleza pri la gastigo de la UK en 2002 finiĝis favore al Fortaleza. Por la Tel-Aviva UK oni fiksas la temon “Lingvo kaj kulturo de paco”. Post longa serĉado la Estraro ĝojis nomumi Stefan MacGill kiel novan komisiiton pri Internacia Infana Kongreseto. ★

programajn 16 horojn (12 en pleno, 4 en laborgrupoj). Konsciaj pri la manko de tempo, ili tamen mirinde bridis sin por ne malŝpari tempon al bagateloj pli ol decas.

Junularo: Tro (mal)kune

Plurfoje oni traktis la junularan agadon. Tiun temon trudis la malmultiĝo de la membraro de TEJO kaj ties problemoj financaj kaj administraj. Prave oni konstatis ke la problemoj parte fontas el nesufiĉaj kunlaboro kaj kontaktoj inter TEJO kaj la cetera UEA. En multaj landoj, precipe eŭropaj, junaj kaj plenaĝulaj movadanoj apenaŭ konas unu la aliajn, dum en Afriko kaj Latina Ameriko ili kunas eble eĉ tro. Konklude la Komitato rezoluciis pri porjunulara agado, i.a. petante la Estraron nomumi komisiiton pri ĝi.

Alain Fournier

La granda Meaulnes

Fama priskribo de pura amo.
La sola verko de la aŭtoro,
kiu mortis nur 27-jara.

El la franca trad. Roger Bernard. Rotterdam/La Laguna: UEA/J. Régulo, 1988/1975 (eldono/preso). 222p. 21cm. Belliteratura serio 32. Prezo: € 10,20.

☞ daŭrigo de p.167

Aliflanke, terglobo tiel plena bezonas tutmondiĝajn fortojn por tutmonde mastrumi sin. Ne nur kiel esperantistoj, sed ankaŭ kiel influhavaj civitanoj en niaj propraj socioj, ni havas devon kaj respondecon insisti pri morala


kaj ekvilibra mastrumo de la nova tutmonda ordo, kiu iom post iom ekestas. Paco ne estas kiel pluvo: ĝi ne simple falas el la ĉielo se la bona Dio tion volas. Ĝi estas kiel domo: oni devas ĝin konstrui, renovigi, prizorgi. Ĝi ne estas natura, sed artefarita — kaj estas arto de la paco, kiun ni esperantistoj devas diligente praktiki. ★

Kvindeka fojo, alta kvalito

En la Berlina UK oni anoncis por la 50-a fojo la rezultojn de la Belartaj Konkursoj de UEA. Pligrandigis la festan karakteron sam-okaza lanĉo de *Lingva arto*, festlibro per kiu UEA omaĝas al William Auld kaj Marjorie Boulton (vidu p. 172).

Vilmos Benczik, prezidanto de la Belartaj Konkursoj kaj redaktoro de *Lingva arto*, skizis en malferma parolado la historion de BK. Kiel la plej longdaŭra seninterrompa arta konkurso de Esperanto, ĝi “dum la pasinta duona jarcento fariĝis certe

unu el la plej stabilaj abutmentoj de la Esperanta literaturo”, kaj “multaj el ĝiaj unuaj premiitoj intertempe fariĝis klasikuloj”. Li elstarigis la kontribuon de Auld kaj Boulton al la Konkursoj, unue kiel multfojaj premiitoj, poste juĝantoj. Nature do ke la lanĉo de la



Pliu ero al la jam dika fasko de BK-diplomoj de Stefan MacGill: dua premio en poezio. (Dekstre: Vilmos Benczik)

Amoroj

Filologoj kaj lingvistoj estas delogistoj.
Ĉar ili ne komprenas la fenomenon kiun ili fakas kaj dissekas.
Ĉar lingvo ne estas entenebla en la dikeco de gramatiko.

Ĉiu lingvo estas vivanta organismo.
Ĝi havas korpon, animon, aspirojn kaj kapricojn.
Ĝi havas sekson, dezirojn kaj bezonojn.
Ĝi sentas voluptemon, seksardon kaj allogojn.

Lingvoj naskiĝas, vivas, mortas, latentas kaj reviviĝas,
Kiel ĉiuj vivantaj organismoj.
Ili amindumas unu alian, amoras kaj naskas,
Kiel ĉiuj vivantaj organismoj.

La latina lingvo havas inan sekson.
Ŝi estas patrineca, dorlotema kaj mamnutra.
Ŝi postlasis longan historion.
Ŝi amindumis kaj amoris pli abunde ol iu ajn alia lingvo.

Kun la helena ŝi havis fortan amaferon.
Tamen tiu rilato estis tro intelekta kaj platona.
Ili sin palpis kaj fingrumis, sed ne koitis, ne generis.
La helena estis tro introspekta vira lingvo.
La etoso de alkovoĵo lin sufokis kaj inhibiciis.
Li preferis la vastecon de areopagoj kaj agoroj.

Tamen ne mankis al la latina ardaĵ amorantoj.
Al ŝi aparte plaĉis la longaj barboj de barbaraj viroj.
Kun ĉi lastaj ŝi seksumis senbride.
Nenia intelekto ĉi tie, nur sekso, volupto kaj orgasmoj.

De tiaj intertraktoj naskiĝis vasta knabinaro.
Tiam okazis senhontaj sangadultoj kaj miksamoroj.
La ĝermanaj barbaroj delogis siajn filinojn kaj generis pluajn idojn.
Aliajn knabinojn fascinis la sunbruna haŭto de berberoj.
Tiel naskiĝis la lingvoj portugala, kataluna, hispana, itala kaj franca.
La portugala kaj la kataluna havas inan sekson.
La hispana, la itala kaj la franca estas maskloj.

El ĉi lastaj la franca estas la plej galanta, kajola kaj miela.
Kiam naskiĝis la knabino Esperanto, li komencis ŝin ĉirkaŭflirti.
Ŝi rezistis kaj prokrastemis, kvankam ŝi kunvolis de la komenco.
Li uzis ĉiujn talentojn de sia konkerema karaktero,
Kaj ŝi cedis.
Ŝi cedis nur unufoje, sed gravediĝe.

Ŝi naskis la knabinon Ido, kiu akiris la misfamon de bastardo.
Tamen tiun misfamon ŝi neniel meritas.
La kuniĝo de ŝiaj gepatroj ne estis kontraŭleĝa.
Ili ambaŭ estis plenaĝaj kaj plene volis.
Okazis nur tio, ke post la faro ili disiĝis por ĉiam.
Ĉar ili konkludis ke ili kongruas unu alian nek korpe nek spirite,
Ke tio estis nenio alia ol momenta nekontraŭstarebla kunlogo,
Kia aperas unu- aŭ dufoje en la vivo de ni ĉiuj.

Sed la knabino pri tio ne kulpas.
Ŝi naskiĝis kaj punkto.
Nun ŝi rajtas vivi, prosperi kaj generi mem.
Tamen ŝi ne rajtas kalumni la patrinon,
Same kiel la patrino ne rajtas malagnoski sian filinon.

La belulino Esperanto ne haltis post tiu fiaska geiĝo.
Ŝi havis kaj plu havas aliajn amaferojn.
Ŝi iom heredis la voluptemon de sia latina avinjo.
Ankaŭ Esperanto ŝatas virojn kun bukla barbo.
Kun la germana vira lingvo ŝi havis aferon kiun multaj kritikis.
Pri ĝi oni verkis eĉ traktatojn.
Sed la plej gravan oni ne diris.
Oni ne diris kial ili ne generis idojn.
Kelkaj asertas ke ŝi gravediĝis kaj abortis.
Kelkaj garantias ke ŝi steriliĝis post la nasko de Ido,
Ke ŝi rajtas plu kreski kaj disvolviĝi, amori kaj ĝui, sed neniam plu naski.
Tamen tio estas nur spekulativoj kaj fantazioj.
Neniu povas diveni la kapablojn de virina ventro.
Virinoj estas la kulmino de la Kreemo.
Ili estas senlimaj kaj neprognoseblaj.
Oni do ne povas paralizi la historion de la ventro de Esperanto.
Oni povas nur dubi, ĉu eblas naski iun ankoraŭ pli belan,
Kaj, se naski iun malpli belan, ĉu indas entute naski.



UEA / F. L. Vauthrey

festlibro okazis lige kun la publika anonco pri la rezultoj de la jubilea BK-eldono. Marjorie Boulton ĉeestis, kaj ŝia dankparolado tuŝis la korojn de la grandnombra publiko per fascina kunigo de ŝiaj klereco, humuro kaj modesto.

Konvene al la jubileo, la konkursaĵoj estis ne nur multaj (entute 102), sed ankaŭ altkvalitaj en multaj branĉoj. Sekve la ĵurio aljuĝis pli da premioj ol kutime. (Vidu la liston en sep., p. 152.) Unika estis la aljuĝo de du unuaj premioj al teatraĵoj de Paul Gubbins. En tiu branĉo la ĵurio ja ofte ne trovas verkon kiu meritis la unuan premion.

Denove malkovriĝis novaj talentoj. Antonio Valén kaj Valentina Maria Nan atingis la unuan lokon en poezio resp. kanto tuj per unuafoja partopreno. Sekve ne estis aljuĝita la speciala premio Nova Talento, per kiu oni kuraĝigas novulon nur iomete maltrafintan "ordinaran" premion.

Laŭ interkonsento kun UEA, la revuo *Fonto* aperigos plej multajn el la premiitaj verkoj. UEA mem planas eldoni antologion de la unuaj 50 jaroj de la Belartaj Konkursoj. Jen dume, ĉisube, la verko kiu en 1999 ricevis trian premion en la poezia branĉo. ★

Kun la angla lingvo Esperanto neniam havis aferon.
Ĉar la angla havas inan sekson,
Kaj neniuj el ili iam montris signojn de lesbeco.

Oni do ne timu ilian kuneston kaj kunvivan,
Ĉar el tio povos rezulti nur reciproka ĵaluzo.
Ĵaluzo estas komuna trajto de virinaj rilatoj.
Oni do ne miru ke la samo povas okazi inter Esperanto kaj la angla.
Oni ankaŭ ne fermu la okulojn, ĉar la realo ĉiam estos la realo,
Eĉ kiam oni ne volos ĝin realo.
Esperanto ĵaluzas la anglan, sed la angla ne ĵaluzas Esperanton.
Ĉar la angla ne timas Esperanton,
Kaj ĵaluzo ĉiam originas el timo.
Tamen la ĵaluzo aŭ la timo de Esperanto estas senbaza kaj ridinda.
Ĉu freŝa junulino kun pintaj cicoj ĵaluzu maljunan virinon kun
mamegoj molaj kaj pendantaj?
Ĉi lasta akumulis pli da spertoj, sed la unua havas la potencialon de
nova stelo en la firmamento.

Kaj cetere la angla ne kulpas ke ŝi ekspansias rapide kaj senhalte.
Ŝi nur obeas la instinkton kaj la naturan leĝon.
Ĉar la natura leĝo diras ke la celo de lingvoj estas ekspansii kaj naski.
Kaj la angla povas nun fieri pri multaj atingoj,
Sed ankaŭ malfieri pri multaj abismoj.
Ĉar la angla estas ne nur la internacia lingvo de komerco, scienco kaj
politiko.
Ŝi estas ankaŭ la lingvo de krimado, gangsterado kaj putinado en la
tuta mondo!
Gravas do ne nur ekspansio, sed ankaŭ kia ekspansio.

Esperanto ankoraŭ ne fariĝis ie la lingvo de krimado.
Ŝi do havas la potencialon ne nur baloni al la nuboj, sed ankaŭ fali en
abismojn.
Se ŝi ekspansios iel ajn, ankaŭ ŝi iam aŭ ie fariĝos la lingvo de
krimado.
La unua paŝo por eviti tion estas formeti la ĵaluzon kaj ridi.
Ridi vaste, senhalte kaj defie.
Ridi pri ĉio, sed precipe pri si mem.
Ridi eĉ pri la fantazio de poetoj kiuj rekomendas ridi.
Ridi pri la rido kaj pri la ridindeco ne ridi pri ĉio ridinda.
Kaj ŝi jam plurfoje kaj plurloke montris la kapablon ridi pri ĉio tia.

Tial ŝi esperas.
Ŝi esperas ke ŝi ĉiam esperos.
Ŝi ĉiumomente flegas tiun fortikan specon de Espero.
Ĉar ŝi scias ke la Espero estas ĝia ovolo,
Ke la Espero estas la daŭrigo de la Eterna Frajo,
Ke la Espero estas la pentekosta versio de la portugala Saŭdado,
Kaj de alipopolaj similaj fermentoj, lerneblaj nur inice.
Ŝi scias ke la Espero bezonas ĉiutagan akvumadon,
Kaj senlacan fekundigon kaj prisemadon.
Tial ŝi bonvenigas poetojn ne nur legindajn, sed eĉ legeblajn.
Tial ŝi ne hontas pri sia eskatologia kredado kaj predikado,
Ĉar ŝi scias ke la granda skota bardo ricevis vizion,
Kiam li diris ke "la celon ni plenumas", kaj "la celo nin konsumas"
(Eĉ se li kredis ke li ne kredas ke ekzistas viziigantoj),
Ĉar ŝi scias ke la "celo" estas plenumata ĉiusilabe,
Ke la "celo" estas aldoni, ne forpreni.
Ke la "celo" estas konservi, ne detrui.
Ke la "celo" estas la palpebla duono de la Espero.

Ŝi scias ĉion tian, ĉar ŝi estas sperta kaj atentema.
Ŝi kapablas aŭskulti la silentan voĉon de la vento,
Kiam ĝi rakontas la mizerojn kaj ĝojojn de ŝiaj antaŭuloj.
Ĝi rakontas kode, sed la kodon ŝi komprenas.

Tial ŝi scias ke ŝi pravas esperi,
Ke ŝi rajtas pravi esperi ke ŝi havas estontecon.

Gonçalo Neves



Ilustracio: F. L. Vauthrey

Merita kvinopo honorita

En Berlino kvin samideanoj fariĝis novaj Honoraj Membroj de UEA.

Petras ČELIAUSKAS (1929, 1957*), Litovio. Emerita instruisto. Aktiva ekde sia esperantistiĝo, li multe artikolis pri esperantologiaj, historiaj, kulturaj kaj lingvaj temoj, kaj ekde 1975 kontribuis per tiaj prelegoj al Baltaj E-Tagoj (BET). Internacie li konatiĝis per sia elstara traduko de *Homo* (1986), poezia ĉefverko de Eduardas Mieželaitis. En E-gazetoj aperis multaj liaj tradukoj el la lingvoj litova, sed ankaŭ rusa kaj bjelorusa. En lingvosciencia verko por granda publiko, *Nuo Babelio iki Esperanto* (1989), li vaste prezentis E-on. Li redaktis du volumojn de *Litovio hodiaŭ* (1987, 1988), plurajn librojn, la kurieron de tri BET-oj kaj de SAT-kongreso (1992), kaj ekde 1995 li estas la redaktoro de *Litova Stelo*. En 1997 li ricevis premion de Fondaĵo Grabowski.

zanto de literaturaj konkursoj. Akademiano (1986-98). Ano de la juĝkomisio de Fondaĵo Grabowski (1990-). Redaktoro de la landa revuo *L'esperanto* (1979-88). Dum dudeko da jaroj (ĝis 1996) literatura redaktoro de *Heroldo de Esperanto*. De 1974 li verkas originale poemojn, rakontojn kaj eseojn,

Baldur RAGNARSSON (1930), Islando. Instruisto, lerneja ĉefinspektoro. Ano de Verkista Asocio de Islando, li verkis dudekon da poeziaj kaj fakaj libroj islande. Lerninte E-on kiel gimnaziano, li aktivis lande kaj internacie ekde 1952: kiel LKK-prezidanto de la Rejkjavika UK (1977), estrarano de UEA pri kulturo kaj eduko (1980-86), ties vicprezidanto (1980-83). Li prezidis la Belartajn Konkursojn de UEA (1975-85). Akademiano ekde 1979, vicprezidanto de E-lingva Verkista Asocio de 1983. Liaj libroj en Esperanto, i.a.: la poemaroj *Ŝtupoj sen nomo* (1959) kaj

Esploroj (1974); la tradukoj *Sub stelo rigida* (1963) kaj *Islandaj pravoĉoj* (el la malnova literaturo islanda, 1964); la lernilo *Ný kemslibók í Esperanto*, (1987) kaj la prelegaro *La poezia arto* (1988); multaj tradukoj kaj artikoloj diversrevue.

YAMASAKI Seikō (1929, 1946), Japanio. Universitata docento pri internacia komerco kaj angla lingvo, li laboris en la internacia komerco (1952-86) kaj poste pri trejnado de ofistoj en komerco. Direktoro (estra-

rano) de Japana E-Instituto (1987-), komitatano de UEA (1989-), membro de ties lingvopolitika komisiono (1996-98). Akademiano (1992-), direktoro de la Akademia komisiono pri landaj lingvoinstitutoj (1995-). Estrarano de Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo (1987-) kaj de Internacia Scienco Asocio E-ista (1995-); sekretario de Tutmonda E-ista Ĵurnalista Asocio (1995-). Fakdelegito pri ekonomio. Li aŭtoris la komparan studon *La artikolo* (1989) kaj *Etimologia vortaro pragmata de Esperanto* (1990, 1991). Li ofte artikolas pri lingvaj kaj ekonomikaj temoj kaj prelegas en UK kaj aliaj E-aranĝoj. ★



YAMASAKI Seikō

Baldur RAGNARSSON

Ĥristo GOROV

Aldo DE' GIORGI

Petras ČELIAUSKAS

Aldo DE' GIORGI (1924, 1952), Italio. Emerita librotenisto. Elstara aganto de la Esperanta kulturo: komisiito de UEA pri kulturo (1977-80), ano de ties kultura konsilio (1978-80), juĝanto pri poezio en la Belartaj Konkursoj de UEA (1981-98) kaj organi-

ofte konkurse premiitajn. Li aperigis la poemaron *Pretertempe* (1982) kaj redaktis la plenan poemaron de William Auld, *En barko senpilota* (1987).

Ĥristo GOROV (1908-1999), Bulgario. Vidu ĉe "Forpasoj", p. 180.

Internacia Kongresa Universitato

En Tel-Avivo okazos la 53-a sesio de IKU, kie rajtas prelegi universitataj profesoroj aŭ personoj kun simila kvalifiko. Preleg-proponojn prezentu al **prof. d-ro H. M. Maitzen (Endemanngasse 6-18/1/24, AT-1230 Wien, Aŭstrio; maitzen@avia1.una.ac.at)**, la sekretario de la IKU-komisiono. La propono enhavu koncizajn prelegresumon (maks. 200 vortoj) kaj biografion kun persona bibliografio. La prelego laŭeble (ne devige) rilatu al la kongresa temo, "Lingvo kaj kulturo de paco". La elektitaj prelegantoj ricevos modestan honorarion, sed ne kosto-repagon. Ĉiu preleganto devas esti kongresano kaj mem zorgi pri sia aliĝo. Aparte bonvenas junaj kandidatoj kaj unuafojaj IKU-prelegantoj. **Limdato por kandidatigo: 15 jan. 2000.**

*Eventuala dua jaro indikas la daton de esperantistiĝo.

KOTIZTABELO DE UEA POR 2000

Lando/valuto	MG	MJ(-T)	MA(-T)	SA	Kto	SZ
Aŭstralio/dolaro	14	34	85	51	31	170
Aŭstrio/eŭro	7,63	19,26	47,96	30,52	18,17	95,93
Aŭstrio/ŝilingo	105	265	660	420	250	1320
Belgio/eŭro	7,68	19,21	48,09	30,61	18,34	96,18
Belgio/franko	310	775	1940	1235	740	3880
Britio/pundo	5	14	34	21	13	68
Ĉeĥio/krono	170	420	1050	630	380	2100
Danio/krono	55	140	355	230	135	710
Finnlando/eŭro	7,57	19,34	47,93	30,27	18,50	95,87
Finnlando/marko	45	115	285	180	110	570
Francio/eŭro	7,62	19,06	48,02	30,49	18,29	96,04
Francio/franko	50	125	315	200	120	630
Germanio/eŭro	7,67	19,43	48,06	30,17	18,41	96,12
Germanio/marko	15	38	94	59	36	188
Greklando/drakmo	1700	4300	10700	6800	4100	21400
Hispanio/eŭro	6,61	16,23	40,87	25,84	15,63	81,74
Hispanio/peseto	1100	2700	6800	4300	2600	13600
Hungario/forinto	1100	2800	7100	4300	2600	14200
Irlando/eŭro	7,62	19,05	47,93	30,47	17,78	95,86
Irlando/pundo	6	15	37,75	24	14	75,50
Islando/eŭro	8	19	48	29	17	96
Israelo/eŭro	6	16	39	23	14	78
Italio/eŭro	7,75	19,11	48,03	30,47	18,59	96,06
Italio/liro	15000	37000	93000	59000	36000	186000
Japanio/eno	1000	2600	6500	3900	2300	13000
Kanado/dolaro	13	33	82	49	29	164
Nederlando/eŭro	8	19	48	31	18	96
Nederlando/guldeno	17,63	41,87	105,78	68,32	39,67	211,56
Norvegio/krono	65	165	415	250	150	830
Nov-Zelando/dolaro	16	40	100	60	36	200
Portugalio/eŭro	5,99	14,96	37,41	23,94	14,47	74,82
Portugalio/eskudo	1200	3000	7500	4800	2900	15000
Slovakio/krono	180	460	1150	690	410	2300
Svedio/krono	70	170	430	275	165	860
Svislando/franko	12	31	78	47	28	156
Usono/dolaro	9	23	57	34	20	114
TARIFO A/eŭro	5	13	32	19	11	64
TARIFO B/eŭro	4	10	24	14	9	48

ALIAJ LANDOJ: Luksemburgio laŭ Belgio, San-Marino laŭ Italio, Liĥtenŝtejno laŭ Svislando.

TARIFO A: Honkongo, Korea Resp., Malto, Singapuro, Sud-Afriko, Tajvano.

TARIFO B: Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

MG: Individua Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado

MJ(-T): Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkl. 29 jaroj, membro de TEJO kun la revuo *Kontakto* sen plia abonpago)

MA(-T): Individua Membro-Abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo *Esperanto*

DM: Dumviva Membro: pagas por la tuta vivo 25-oblon de la kotizo MA; ricevas la Jarlibron, la revuon *Esperanto*, kaj ĝis inkl. 29 jaroj, la revuon *Kontakto*

SA: Simpla abono al la revuo *Esperanto*, sen membreco en UEA

Kto: Abono al la revuo *Kontakto*, sen membreco en UEA/TEJO

SZ: Kotizo por Societo Zamenhof: mecenata kategorio (aldoniĝas al alia kotizo; ne inkluzivas membrecon en UEA)

PT: Patrono de TEJO: pagas 3-oble la kotizon de MJ(-T) por subteni TEJO (ne inkluzivas membrecon); ricevas la revuon *Kontakto* kaj aliajn eldonaĵojn de TEJO

Fiaska dulingveco?

UEA estis reprezentata de prof. Jouko Lindstedt en la dua konferenco de Eŭropa Konsilio por Lingvoj (1-3 jul., Jyväskylä, Finnlando).

Ekde la fondo (vidu okt. '97, p. 165) UEA membras en ĉi tiu konsilio de superaj lernejoj kaj lingvaj asocioj, kiu celas plibonigon de la lingvaj kaj kulturaj konoj en kaj ekster EU (vidu <http://userpage.fu-berlin.de/~elc/>).


Temis ĉefe pri lingvoinstruado universitata kaj altlerneja. La sistemo de laborgrupoj, kun kelkaj komunaj prelegoj sed malmulte da kuna diskutado, malhelpis min detale prezenti interesajn projektojn el la eŭropa agado de UEA. Diverslingvaj kopioj de la Manifesto de Prago tamen facile disdoniĝis.

Kelkaj demandis ŝerce dum la paŭzoj ĉu mi deklaras E-on la solvo por ĉiuj problemoj diskutataj. Anstataŭe, dum la senfunde optimisma ferma kunsido mi estis la sola kiu vere kritikis: eŭropaj organoj celas ke ĉiu eŭropano sciopovu du fremdajn lingvojn, sed tio estas nerealisma ambicio; krome, se unu el la du instruataj lingvoj estas la ĉie populara angla, kial lernejoj volus lerni kaj uzi alian lingvon?

La ĉeestantaj lingvistoj, kiuj lernas lingvojn pro pura intereso, ŝajne ne plene komprenas la pli praktikan sintenon de ordinara eŭropano. Tamen, ekz. Michel Fournié (el la fama franca lingvoinstituto INALCO) ja rimarkigis en sia referaĵo ke la bildo de la angla kiel "la internacia lingvo" malpliigas la emon studi aliajn lingvojn de siaj najbaroj. Private li diris ke li interesiĝas pri E-o kiel fenomeno, kvankam li malŝatas la "aktivismon" de la e-istoj kiuj sin turnas al li kun proponoj.

Parenteze, la lingva realo eĉ en la konferenco mem kvazaŭ pruvis la fiaskon de la dulingva politiko. Ĝiaj oficialaj lingvoj estis la angla kaj franca, sed pro la grandparte nord-eŭropa partoprenantaro franglingvaj prelegoj ne estis kompreneblaj por ĉiuj, kaj fine la laborgrupoj raportis nur angle, ricevinte tian rekomendon de la organizantoj.

Jouko Lindstedt - Finnlando



Recenzoj

Originala beletra

Indaj jubileaj kontribuoj

Lingva arto. Jubilea libro omaĝe al William Auld kaj Marjorie Boulton. Red. Vilmos Benczik. Rotterdam: UEA, 1999. 5+217p. 21cm. € 16,50. Triona rabato ekde tri ekz. **75 jaroj.** William Auld. Intervjuis kaj redaktis Aleksander Korĵenkov. Jekaterinburg: Sezonoj, 1999. 47+8 fotopaĝoj. 20cm. € 4,00.

Enmodiĝis la kutimo festi jubileulojn per komuna verko fare de amikoj aŭ aprezantoj; tiel estis kiam Waringhien fariĝis 75-jara, same tiel kiam Hauptenthal iĝis 50-jara; baldaŭ aperos festlibro honore al la 50-jariĝo de Silfer kaj alia memore al la 90-jara jubileo de la naskiĝo de Ivo Lapenna. La strukturo estas do elprovita, kaj ankaŭ ĉi-foje ĝi plene trafis sian celon.

Al la jubileo (75-jariĝo) de niaj du ĉefaj verkistoj, M. Boulton kaj W. Auld, UEA volis dediĉi volumon pri la lingva arto, ĉar, kiel diras la postkovrila dediĉo, ili "havis grandegan meriton en tio ke Esperanto fariĝis lingvo moderna en ĉiuj sencoj". La redaktoro V. Benczik sukcesis kolekti 24 eseojn pri diversaj temoj, kiuj nur etparte rilatas rekte al la jubileuloj; la plimulto pritraktas iufoje facilajn, aliffoje nefacilajn temojn pri la lingvo en si mem, pri



Marjorie Boulton transprenas ekzempleron de *Lingva Arto* de redaktoro Vilmos Benczik. (Vidu p. 168.)

neologismoj, pri traktado de niaj verkistoj, kaj pri multo alia interesa. Inter la kunverkintoj troveblas la kremo de la E-literatura kritiko: al 11 akademianoj aldoniĝas universitataj profesoroj, poetoj, eseistoj. La geografia deveno estas ekvilibra, kun deko da neeŭropanoj kontraŭpezantaj la alian duonon. Malfacilas elekti kiu estas la plej bona eseo, ĉu la prologa

"Lingvo, skribo, literaturo" de V. Benczik, aŭ "Unu ringo ilin regas" de A. Korĵenkov, kiu detale esploras la verkojn de Tolkien kaj la tradukojn fare de Auld, aŭ la aliro al urbo Berlino vidata tra la verkoj de Varankin kaj Schwartz (eseo de P. Gubins), aŭ konsideroj pri la semiotikaj aspektoj de la E-poezio, fare de B. Ragnarsson, aŭ ankoraŭ iu alia.

Grandan guon estetikan proponas la versaro en la eseo de MAO Zifu, kvankam ĝi estas ekscese persona kaj personisma, kaj la pronomo "mi" tede ripe tiĝas preskaŭ ĉiulinie; bedaŭrinde ankaŭ mankas glosaro helpa al tiuj legantoj kiuj ne avancis preter PIV. (Camacho diras pri nia Mao, aliesee, "poetego, kiun neniu devigas legi": fakte, kiu engaĝas sin en la lukto por kompreni la poezion de Mao, estas, post venko, plene rekom-pencita.) Sabine Fiedler

eseas ekzamenante iujn frazojn el konataj verkoj kie la senco estas komprenebla, aŭ la aludo kaptebla, nur se oni konas aliajn tekstojn (tia referencostilo nomiĝas *inter-teksteco*). Aliaj eseoj estas preskaŭ nur simple listoj de verkoj aŭ de fenomenoj troveblaj en la verkoj de la jubileuloj; sed originala en tia speco estas la listo kolektita de J. Wells per la diversaj serĉobotoj en la

Language Problems & Language Planning

Journal of the Center for Research and Documentation of World Language Problems

La problemoj. La solvoj.
La rolo de planado
en la homa komunikado.
Kaj la kontribuo de Esperanto.

Redaktas: Probal Daŝgupto,
Marc van Oostendorp, Humphrey Tonkin.
Eldonas: John Benjamins, Amsterdam.
Aperas trifoje jare.
Abonoj: individua €46,30; institucia €99,85
Abonu pere de la Libroservo de UEA.

Tut-Tera Teksaĵo. La verkoj de la jubileuloj ankoraŭ ne estas vaste trafelblaj tra la TTT, sed la ligoj plinombriĝas ĉiutage.

Eble nur unu-du kontribuaĵojn mi taksus neinteresaj, aŭ ĉar la enhavo estas tro surfaca, aŭ pli-malpli ĝenerale konata, aŭ ĉar la specifa temo estas iom harfende traktita, aŭ ĉar la kontribuinto celis ne legantojn, sed preskaŭ nur sin mem. Ĉio cetera estas vere inda je meditado, kaj kelkfoje stimulus dialogadon, ekzemple kiam M. de Seabra diras ke inter la jam etnombra publiko de Auld troviĝas pli da interesiĝantoj pri la lingvo ol pri la arto; aŭ kiam T. Huĝimoto prave levas la problemon pri rekompenco de la aŭtorado: presisto, bindisto, engaĝigisto, ĉiuj gajnas tra la eldonado de libro, kial ne la aŭtoro? Alia konsiderinda kontribuado estas tiu de Montagut pri la lingvaj funkcioj: malfacilus trovi tiel klare kaj sinteze esprimitan koneksion kun (mal)facileco de la koncerna lingvo.

Kompleta bibliografio de la du gepoetoj kompletigas la volumon; specife aranĝitaj biografioj mankas, sed pri Auld la eseo de E. de Kock estas esence biografio, kaj ŝtopas la truon. Tute konklude, la verko estas vere inda kaj je la jubileuloj, kaj je la E-kulturo entute.

La alia libro estas kelkdekpaĝa verketo de W. Auld pri siaj 75 jaroj; tute honeste, la famo de la aŭtoro igus la leganton atendi pli. Auld deklaras ke li respondis al insisto, sed ke li taksas sian vivon ne aparte eventoplena. Pro tiu lia konfesia pigreco verki mem ion pri si, la teksto spegulas intervjuon aranĝitan, registritan kaj postredaktitan de A. Korĵenkov, en kiu Auld rakontas, iom plate, pri la knabaj jaroj, la militaj, la aviado kaj pilotado, la renkontiĝo kun Esperanto kaj kun Reto Rossetti, rolinta mentore; kaj ankoraŭ, la studado ĉe la universitato, la fianĉiĝo kaj poste edziĝo, la familio, la kariero ĉe mezgrada lernejo, la kandidatigo al la Nobel-premio. La partoprenon en la Akademio kaj la redaktadon de revuoj li apenaŭ tuŝas, tute preterpase.

Bonajn amikojn li mencias, ĉiam kun sento de danko. Vivo ordinara, preskaŭ banala, sisteme optimisma, tute morala laŭ la plej klasikaj kanonoj de kristanismo (kvankam Auld sin deklaras senreligia); oni povus sin demandi el kiaj spertoj burĝonis la grandioza inspiro de lia poezio. Tre interesaj iuj mencioj pri liaj preferoj kaj gustoj en la literaturo.

La libreto konsistas duone el kolekto de poemoj elektitaj de Auld mem, ne unuafoje aperantaj, tamen oportune kolektitaj ĉi tie, ĉar ne ĉiam facile troveblaj. Antologieto spegulas personan guston, kaj alia kritikisto estus certe elektinta aliajn versojn kiel reprezentajn de tiom multfaceta poeto.

Carlo Minnaja - Italio

NAVIGE TRA TTT-PAĜOJ

Jen kelkaj verdaj gutoj el la
inform-oceano de Tut-Tera
Teksaĵo. Sciigu nin pri pluaj
konsultindaj paĝoj Esperantaj!



FAKAJ ASOCIOJ

Amikaro Bruno Gröning (saniĝo perspirita): <http://www.bruno-groening.de/esperanto/>
Sennacieca Asocio Tutmonda: <http://www.multimania.com/satesperanto/>

INSTRUADO

Internacia E-Instituto (Hago) gastas ĉe la UEA-paĝo: <http://www.Esperanto.org/iei/>
Lerneja uzo de Esperanto (francalingva): <http://freinet.org/creactif/bruyeres/>

KONGRESO

UK en Tel-Avivo: http://ourworld.compuserve.com/homepages/profcon/m_uk85.htm/

LANDOJ, REGIONOJ

Hispanio, Andaluzia E-Unuiĝo: www.ciudadfutura.com/esperanto/
Litova E-Asocio: <http://www.is.lt/LEA/>
Pola Esperanto-Asocio: <http://www.pze.w.pl/>

LITERATURO

Ĉio pri Claude Piron: <http://sites.netscape.net/Pironejo/>
Tradukoj el la nederlanda literaturo, de Michiel Meeuwissen (Bordewijk, Elsschot, Multatuli k.a.): <http://www.geocities.com/Athens/Acropolis/4675/esperanto.html/>
Daŭre riĉiĝas la literaturaj paĝoj sub la zorgo de Don Harlow: <http://www.best.com/~donh/Esperanto/Literaturo/literaturo.html/>

POLITIKO

La Verduloj, franca (registara) partio: <http://www.verts.imagnet.fr/esperanto.html/>

REVUOJ

La Ondo de Esperanto: <http://www.sezonoj.itgo.com/>
Rok'-Gazet' (plej freŝa: 1999/5. sep.): <http://www.sciuro.demon.co.uk/rokgazet/>

CETERAĴO

Ne-Esperantaj TTT-ejoj uzantaj E-on: <http://perso.wanadoo.fr/esperanto/2.htm/>

NAVIGE EN NAVIGE

La kompleta enhavo de antaŭaj "Navige" troviĝas, kun ligoj, dank' al Herman Deceuninck, ĉe: <http://esperant61.free.fr/esperant14/navigex.htm/>


Patrino koro

Simplaj, romantikaj
rakontoj pri la
esperantista vivo

Nevena Nedelčeva. Rotterdam / La Laguna: UEA/Stafeto, 1988/1975 (eld./preso). 148p. 17 cm. Prezo: €4,10.
Triona rabato ekde 3 ekzempleroj.

lo ĉina por ĉies gusto

Noveloj el antikva Ĉinio. El la ĉina trad. Laŭlum, Liu Caisheng, Hu Guozhu, Shi Chengtai k.a. Pekino: Ĉina E-Eldonejo, 1998. 8+554p. 21cm. Bind. Kromkovrilo. € 24,50.



Dikas kaj belas la verko, kaj la titolo loge tentas al lego: jen verko plena je "noveloj" (en la okcidento oni uzus aliajn terminojn por la ĝenroj prezentataj) aŭ diverslongaj rakontoj, bunta kolekto el preskaŭ du mil jaroj.

La "noveloj" ĉi tie temas pri am(orad)o, (mal)fido inter geedzoj, spiritoj kaj monstroj, prostituitinoj kaj ŝtelistoj, pri trompado, mistrakto de homoj, (mal)venko de justeco ktp. Entute pelmo de la majstra ĉina arto rakonti, ne vere ordigita krom kronologie. Al atenta leganto la rakontoj povas diri multon pri la kredoj kaj kutimoj de malnova Ĉinio, kaj pri tio kiel la modernuloj vidas la antikvajn tempojn. Sed ankaŭ por amuziĝo la verko taŭgas: foje parodia, foje serioza, kaj pleje distra. Por ĉiu gusto enestas novelo. Por scienculoj ankaŭ piednotoj.

Tamen, malgraŭ ampleksa kaj kelkloke vere laŭdinda laboro de pluraj tradukistoj, ne malmultas eraroj pro malkono de la en-kaj eksterlanda historio, kaj iufoje pro malbona rego de la klasika ĉina lingvo kaj stilo.

La selekto ŝajnas iom unuflanka. Se oni ĉefe celis amuzi, la kolekto ja enhavas ĝustan miksaĵon de krimo, sekso, supernaturaj estaĵoj kaj feliĉaj finoj. Sed se la celo estis prezenti la longan, belegan tradicion ĉinan de "noveloj", tiam mankegas pluraj klasikuloj gravaj kaj famaj.

Laste kaj balaste: la piednotoj foje pli konfuzas ol klarigas; al nefakuloj kaj neĉinoj ili diras malmulton. Tamen, mi levas la ĉapelon antaŭ Ĉina E-Eldonejo, kiu entreprenis publikigi tiom grandan verkon.

Sabira Ståhlberg - Bulgario

Omaĝo al tirkesta klasikaĵo

Luĉifero (1883). Mihai Eminescu (1850-89). El la rumana trad. Jozefo Petrin. San Francisco: California Publishing Co., 1998. 47p. 21cm. Ilus. € 4,80.

La ĉefverko de ĉi tiu rumana poeto aperis Esperante 115 jarojn post la unua rumana eldono. Ne nur en la rumana literaturo Eminescu eminentas: laŭ la postparolo, G. B. Shaw lin admiris kaj pledis por la eldono de liaj versoj en 1930.

La verko malkaŝas pensulon vast-kulturan, kies talento tragike pereis — kiel oftas ĉe grandaj poetoj en Orienta Eŭropo.

Liaj filozofi-fonaj poemoj siatempe ŝokis la publikon, ne laste pro lia fasciniĝo pri erotikaj motivoj. La senriproĉa metriko kaj la forta influo de rumanaĵoj popolversoj reliefigas ankaŭ en ĉi tiu traduko.

La verko estis tradukita al pli ol 50 lingvoj. La E-traduko de Jozefo Petrin (1905-75)



aperis dank' al Gigi Harabagiu. Jen bela ekzemplo ke la enhavo de niaj tirkestoj ne devas malaperi, eĉ kvaron-jarcenton post la morto, se troviĝas konanto de la enhavo: Harabagiu, la ilustranto Vladuca Partener kaj anonima financanto liberigis el la tirkesta mallumo la tradukon de Petrin.

Jozefo Petrin amis la rumanan kulturon kaj Esperanton. Izolita de la mondo en sia

Bukareŝta ĉambro, li verŝis la pensojn de Eminescu al tiuj kiuj vivas for de lia kulturateco. Ŝatantoj de klasikaj literaturaĵoj, kolektantoj de verkoj de Unesko-premiitaj poetoj kaj estimantoj de malfeliĉaj geniuloj el Orienta Eŭropo kun bonvolemo akceptos ĉi tiun escepte dikliteran verkon.

Spomenka Štimec - Kroatio

Originala poezio

Plulega petpostulo

Infaneske. Rimis Leen Deij (1919); skizis Lilli Giloteaux. Croix: L. Giloteaux, 1997. 46p. 21cm. € 3,30.


"Ho, ne! Prefere la hieraŭan bildstrion de Huck Finn!" Jen reago de ok-jarulino, kiam mi proponis ĉi tiun vers-libreton. Tamen, post la unuaj deklamoj, Karina age recenzis por

mi la verkon, turnante tuj la paĝojn kun plulega pet-postulo, apenaŭ haltante admiri la ĉiupaĝajn desegnaĵojn. Libromeza ĉeso provokis vigan proteston. Ofte amuzaj ("Kion amiko"), foje aparte etosriĉaj ("Infanludejo"), la 36 versaĵoj gamas en longeco de ses linioj ĝis du paĝoj. Ili estas plaĉe kaj ingenie konstruitaj, kun variaj rimskemoj. Ili ja postulas bonan lingvoscion de infana aŭskultanto/leganto — eĉ Paĉjo peliĝis vortaren dufoje. Ĉefaj temoj estas bestoj kaj infanoj ludantaj. La teknika prezentiĝo estas neluksa kaj senpretenda, sed la materialo bone spacita. La verko parolu por si mem:

Dum futbol-matĉo elefanto senintence muson "pro mispaŝo en la sablon premis. / 'Ho, pardonu!' la rostrulo ĝemis / kaj al sabla truo strabis time. / Sed la muso ĉepis larĝanime: / 'Vi ne pentu, kara, tiel drame / ja al mi okazi povus same!'" "Tute ne!" reagis Karina: "Krom se ĝi fariĝus granda kiel Godzilla!"

Hodiaŭ ni certe finlegos la verkon.

Karina kaj Stefan MacGill - Hungario



Laste aperis



Estona-Esperanta vortaro. *Eesti-Esperanto sõnaraamat.* Jaan Ojalo (1914). Tallinn: E-Asocio de Estonio, 1999. 313p. ISBN 9985 9130 2 7. 21cm. Bind. Mezgranda vortaro, kun pli ol 10 000 kapvortoj. € 18,00.

Evropou a Asiŭ na kole a s Esperantem (1974). Lucien A. Peraire. El Esperanto en la ĉeĥan trad. Jindřiška Drahotová. Mnichovo Hradiště: MAB - Výtvarné Práce, 1999. 85p. 21cm. Traduko de *Tra la mondo per biciklo kaj Esperanto*, pri unika vojaĝo de franca laboristo en 1927-32. € 3,90.

Fazodiagramoj. *Enkonduko al materialscienco.* Rob Vetter (1934). La aŭtoro, 1999 (reprezo de la 1-a eld., 1988). 42p. 20cm. Klara prezento celita al unuajaraj universitataj studentoj. € 4,50. Triona rabato ekde tri ekz.

Globalization and International Language. *A Unique Opportunity - or a Missed Chance?* Andrea Chiti-Batelli. Rome: la aŭtoro, 1999. 11p. 21cm. Vidu *Tutmondiĝo kaj internacia lingvo*. € 0,50. Triona rabato ekde tri ekz.

Hidromekaniko kaj varm-interŝanĝo. *Resumo de lekciroj.* A. A. Ŝejpak (1932). Moskva Ŝtata Industria Universitato, 1999. 35p. 21cm. € 3,00.

Historio de Esperanto-movado en Bjaliŝtoko. Zofia Banet-Fornalowa (1929). Svidniko: Lublina E-Instituto, 1999. 178p. 27cm. Monografio pri pli ol 100 jaroj da Esperanto-vivo en ties naskiĝloko. € 16,50.

Kulturo kaj sano. *Referaĵo por la Monda Jardeko de Kultura Evoluigo.* Mervyn Claxton. El la angla trad. Helga Rapley. Rotterdam: UEA, 1999. 42p. ISBN 92 9017 060 3. 21cm. Kiel evoluis la konceptoj de sano kaj malsano en diversaj lokoj kaj epokoj. Verkita por Unesko, de trinidada klerulo. € 5,40. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Kurta historio de E-movado en Ĥarkiv. Dmitrij M. Cibulevskij (1946). Ĥarkiv: la aŭtoro, 1999. 84p. 21cm. Kun fotoj. Jarcento da E-vivo en ukrainia urbo. € 3,90.

Kongresa libro. *84-a Universala Kongreso de Esperanto. Berlino, 31 julio - 7 aŭgusto 1999.* Red. Nikola Rašić. Rotterdam: UEA, 1999. 152 p. 21cm. € 5,45. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Literaturaj provoj. Dmitrij Cibulevskij. (1946). Ĥarkiv: la aŭtoro, 1999. 68p. 21cm. Ilus. Rakontoj originalaj kaj tradukitaj (el la rusa kaj ukraina), kaj poeziaĵoj. € 3,90.

Mi pafos min kaj mortos kiel mil. Józef Czechowicz (1903-39). El la pola trad. Kris Long. Svidniko, 1992. 130p. 28cm. Verkoj de unu el la plej grandaj polaj poetoj, antaŭsentaj pri la mondmilita katastrofo. € 15,90.

Mi vivas, por ke la homaro vivu plu. Bruno Gröning (1906-59). El la germana. Mönchengladbach: Grete Häusler GmbH,

85161 02 3. 21cm. 12 kantoj kun muziknotoj. € 0,60.

Skizo de Yumeiĥo historio. Masayuki Saionji (1943). Tokio: IIPMP, 1999. 31p. 21cm. Kronologia prezento de la progresoj de orienta masaĝa terapio en la 90-aj jaroj. € 0,90. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Tendaraj tagoj - A Course Guide for English-speaking Children. Malcolm Jones (1949), Angela Tellier (1956). Angla kaj Diabla, 1999. 20p. 30cm. Anglalingva. Akompane al kajero 1 de *Tendaraj tagoj*. € 3,60.

Triptiko de amrakontoj de Tang-dinastio. Yuan Zhen (779-831), Jiang Fang (ĉ. 780-830), Bai Xingjian (775-826). El la ĉina trad. Hu Guozhu. Wuhan: Penseo, 1998. 80p. 19cm. Tri historioj el epoko kiam la ĉina novelarto plivastigis sian temaron por doni "panoramon de reala socia vivo". € 3,90.

Tropika poemaro. Oluwábùnmí Òshó-Davies (1968). Roterdamo: UEA, 1999. 24p. 21cm. Niĝeria aŭtoro pri amikeco, renkontiĝoj, memoroj. € 1,80. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.


Tutmondiĝo kaj internacia lingvo. Ĉu oportunaĵo unika - aŭ favora ŝanco maltrafita? Andrea Chiti-Batelli. El la itala trad. Umberto Broccatelli. Romo: la aŭtoro, 1999. 10p. 21cm. Kontribuo al la Berlina kongresa temo. € 0,50. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Urso-kurso. *Kajeroj 1-4.* Esperanto Teachers' Association, 1997/98. 35+39+39+31p. 30cm. Koloro ilus. Lernilo por infanoj, prefere kun plenkreskula akompano. Trioble 6 lecionoj + "la taglibro de Elena". Kun multaj ludoj kaj distraĵ ekzercoj. € 39,00.

Vagante tra la francaj Esperanto-poŝtkartoj. Franca esperantisto: *Speciala historia n-ro, junio 1999.* Jean Amouroux (1937). Paris: UFE, 1999. 82p. 21cm. Reprodukto, kun priskriboj kaj komentoj, de pli ol 160 E-rilataj kartoj, de la komencoj ĝis la dua mondmilito. € 6,00.

Verdluma stelo. Matabaro Minani Semutwa. Roterdamo: UEA, 1999. 21p. 21cm. 17 poemoj de kongolandano, inspiritaj de Afriko kaj E-o. € 1,80. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Daŭrigo sur p. 179



Kreskas Kolekto 2000 de Eurokka (Ŝako) kaj la Unesko-serio de UEA (supre).

1999. 91p. 19cm. De kaj pri viro kiu sanigis per spiritaĵ fortoj. € 7,80.

Nomaro de la forsta ligneca flaŭro de Eŭropo. *Scienc-latina / Esperanta / germana.* Ingward Ullrich. Eberswalde: Förderverein Lexicon Silvestre e.V., 1999. 174p. 30cm. 469 nomoj de plantoj. € 25,50.

Novaj vojoj (la pacproblemo). Hector Hodler (1887-1920). Red. Tomasz Chmielik. Svidniko: Lublina E-Instituto, 1999. 88p. 27cm. Tekstoj el 1915-1917. € 9,90.

Okulo. Stefan MacGill (1948). Ilustris Mónika Molnár. Budapeŝto: ILEI, 1999. Proveldono. 38p. 22cm. Amuza lern-helpilo por infanoj. € 3,90.

Pri la penso de Hector Hodler. Claude Gacond (1931). Red. Tomasz Chmielik. Svidniko: Lublina E-Instituto, 1999. 48p. 27cm. Studoj aperintaj en *Monata Cirkulero de KCE* en 1980-82. € 7,50.

Sentencoj. Bruno Gröning (1906-59). Kompilis Thomas Busse. El la germana. Mönchengladbach: Grete Häusler GmbH, 1997. 77p. 13cm. Vortoj de spirita saniginto. € 2,70.

Serĉante dion. *Kantareto de pilgrimanto.* Red. Wiesław Tomaszewski. Varsovio: Mozaiko, 1990. 14p. ISBN 83

Furoraĵoj de la Kongresa Libroservo '99

La Kongresa Libro-servo en Berlino proponis entute 1800 titolojn (inkluzive de kelkdeko da kasedoj, kompaktdiskoj, vidbendoj, insignoj k.a. esperantaĵoj). Aldoniĝis pli ol 300 brokantaj titoloj. La vendosumo atingis ĉirkaŭ 59 000 eŭrojn.

Kaj plue...

TITOLO

VENDOJ

PREZO (EŬROJ)

1.	<i>Internacia Kongresa Universitato 1999</i>	142	7,80
2.	<i>Homaj rajtoj: demandoj kaj respondoj</i> , L. Levin	100	10,90
3.	<i>Großes Wörterbuch Esperanto-Deutsch</i> , E.-D. Krause	84	32,80
4.	<i>Ĉiuj kune</i> (aktoj de la 1-a kunsido de la Strategia Forumo)	64	2,15
5.	<i>Lingva arto</i> , red. V. Benczik (omaĝe al Auld kaj Boulton)	60	16,50
6.	<i>Internaciaj ekzamenoj de ILEI/UEA</i> (gvidilo)	56	3,00
7.	<i>Pasporta servo 1999</i> (listo de gastigantoj)	54	10,90
8.	<i>Apartaj mondoj: Verboj kaj participoj</i> ² , G. Mattos	48	3,30
9-10.	<i>Kio ni estas kaj kion ni celas</i> (pri la Praga Manifesto)	44	5,50
	<i>Esperanto. Das neue Latein der Kirche</i> ¹ , U. Matthias	44	9,00
11.	<i>Okulo</i> , S. MacGill (lernolibro, proveldono)	42	3,90
12.	<i>Spirito de Esperanto kaj la samideanaj malamikaĵoj</i> , I. Bociort	40	1,50
13-14.	<i>Die gefährliche Sprache</i> ¹ , U. Lins (La danĝera lingvo germane)	39	6,90
	<i>La Jaro 2000</i> ¹ , poŝkalendaro de <i>Monato</i>	39	5,00
15.	<i>William Auld – 75 jaroj</i> , red. A. Korĵenkov	34	4,20
16-17.	<i>Liberigo / Eine Befreiung</i> , K. May (dulingva romano)	32	18,60
	<i>Ni tostus la verdan fortunon</i> , K-disko de G. Handzlik	32	15,00
18.	<i>Al lingva demokratio</i> , red. M. Fettes kaj S. Bolduc (aktoj de la 1-a Nitobe-Simpozio)	31	10,80
19-20.	<i>Taschenwörterbuch Deutsch-Esperanto</i> ^{1,2}	30	2,00
	<i>Esperanto-Wörterbuch</i> , U. Matthias (poŝvortaro)	30	1,50

1 = venditaj rabate 2 = Ne plu havebla



BELGIO: E-kurso revenas

En Antverpeno Esperanto aperas sur la listo de urbaj kursoj oficiale rekonataj jam 30 jarojn. Tamen, post la lernojaro 1998-99 oni ĝin forigis ĉar "ĝi ne sinifas plusvaloron en la labor-merkato". Per komuna strebo Flandra Esperanto-Ligo, la Esperanto-kursetoj kaj la direktorino de la urba kursaro, Hilde Snels, sukcesis tamen nuligi la decidon. Nun Esperanto reaperas en la studprogramo, apud la lingvoj angla, franca, germana, hispana, nederlanda kaj stenografio/tajpado. Notinda estas tamen ke post unu jaro "la situacio de Esperanto" estos reekzamenita. (*Horizontaal*)

GERMANIO: Nova estraro

Dum la UK en Berlino, Germana Esperanto-Asocio elektis novan estraron en sia jarkunveno. Prezidanton Frank Stocker sekvas d-ro Rainer Kurz, sed Stocker restas estrarano. Reelegitiĝis Dieter Dungert, Marko Naoki Lins kaj Reinhard Pflüger. (*Pordego al la Kongreso*)

HISPANIO: Mono ne venis

La revuo de Hispana Esperanto-Federacio, *Boletín*, raportis el estrarkunsido de HEF: "Marcos Cruz informis pri la afero 'disco Esperanto', produktita de Julián Ruiz kaj eldonita de Warner antaŭ du jaroj [vidu dec. '96, p. 209]. Siatempe s-ro Ruiz promesis kompensi per 300 000 ESP [= ĉ. € 1800] la helpon ricevitajn de HEF, kiu ofertis disdividi tiun sumon kun la ankaŭ helpintaj asocioj de Britio, Bulgario kaj Rusio. Malgraŭ ĉiaj klopodoj [...] la mono neniam alvenis."

En la urbo Zaragozo la lokaj Fondaĵo Esperanto kaj E-Societo Frateco ekhavis urbocentre komunan sidejon, dank' al mal-avaraj donacoj de e-istoj. (*Boletín*)

HUNGARIO: Mono venis

Kiel ŝtatan subvencion Hungara E-Junularo ricevis 200 mil forintojn (ĉ. € 790); Hungara E-Asocio 800 mil forintojn (ĉ. € 3160). En majo la HEA-estraro konsentis transdoni sian oficejon en la centro de Budapeŝto al ekstera privata firmao; do, al HEA nun restas nur ĝia refunkciigita libro-vendejo en str. Kenyérmező 2. (funkcias lunde, merkrede kaj vendrede ptm). (*Eventoj*)

LITOVIO: Faka sidejo

Ĉi-jare ekfunkciis dua, t.n. faka sidejo de Litova E-Asocio, kie laboras sekretariino Irena Alijo-ŝiūtė (Vilnius, Gedimino pr. 19, kabineto 122; ☎+370/2/391-078; □irenaa@takas.lt). (*Eventoj*)



JURO: De konvencio ĝis ŝtelo

Legu en *Jura Tribuno Internacia* (red. J. M. Rodríguez Hernández, □joser@lander.es) Konvencion de Vieno pri Konsulaj Rilatoj, artikolon pri temo mar-jura, kaj jurrilatajn novaĵojn, de perua-ekvadara limdisputo ĝis akuzo spermo-ŝtela.

VORTARO: Esperantéssta

Poŝvortaro itala-bolonia-itala (ĉ. 500 p.) de IKEL-prezidanto (vidu sep., p. 156) Daniele Vitali kaj poeto Luigi Lepri enhavas ankaŭ la vortojn *Esperant* kaj *esperantéssta*. Ĝia eldonejo, Vallardi, en 1996 eldonis vaste reklamitan E-gvidlibron, *Parlo Esperanto* de Davide Astòri. Nun ĝi planas Esperanto-poŝvortaron, por kiu Itala Esperanto-Federacio ekkampanjis ĉe la membroj. (D. Vitali)

AmUzE: Rideto el Bulgario

AmUzE (<http://www.poboxes.com/amuze>) estas facil-



lingva revuo dumonata, ne movadtema. Ĝi klerigas kaj gajigas per spritaj tekstoj, desegnoj, enigmoj. Redaktas Mariana Evlogieva (BG-1582 Sofia, PK 18, Bulgario; □amuze@poboxes.com) Abonebla ĉe UEA por la jaro 2000 (6 n-roj: €18).

VORTARO: Turmenta historio

En *Debreceana Bulteno* (dumonata, □db@satrax.hu) prof. d-ro Ottó Haszpra skizas la turmentoplenan historion de *Hungara Esperanta Meza Vortaro* (vidu jul.-aŭg., p. 134), specife de la materialo naturscienca-teknika, pri kiu li ĉefrespondecis.

USONO: Unua kursaro sen Cathy

La 30-an fojon okazis ĉi-somere (6-23 julio) la tradicia, oficiale agnoskita Somera Esperanto-Kursaro ĉe Sanfranciska Ŝtata Universitato en Usono. Ĝi estis la unua en kiu ne partoprenis Cathy Schulze, fondintino kaj konstanta prizorginto de la kursoj, kiu forpasis en februaro (vidu apr., p. 80.), transdoninte la organizon taskon al Ellen Eddy.

La kursanoj venis el Usono (23), Japanio (11), Svedio (3), Britio, Kanado, Kostariko (po 2), Havajo kaj Meksiko (po 1). Pro ilia diversnacieco, en la klasĉambro preskaŭ nur Esperanton uzis la same plurnacia instruistaro: usonano loĝanta en Japanio (Joel Brozovsky); argentinano loĝanta en Nederlando (Atilio Orellana Rojas); usonano kaj polino el Kanado (Mark Fettes resp. Maria Hopkins).

"Jarduono da universitata lernado densigita en nur tri semajnojn" priskribas Brozovsky la kursaron. "Por lingvo tia intensa, 'plentempa' lernado tre taŭgas." La lernantoj, laborantaj je kvar niveloj, havis tage po tri horojn en la klasĉambro kaj ĉ. kvin horojn da hejmtaskoj. Helpinstruisto Hopkins organizis vesperajn kaj semajnfinajn programojn amuzajn kaj interesajn.

En pluraj posttagmezoj kelkaj kursanoj ankaŭ aktoris en la vidbenda E-kurso *Pasporto al la tuta mondo* (vidu jul.-aŭg., p. 139.), kies profesia surbendigo samtempis kun la kursoj. Ankaŭ la instruistoj aperis en la bendo kiel klientoj en la Esperanta kafejo.

(J. Brozovsky)



Corrinne Bouchard



uri *Shinbun*, la plej grandkvante eldonata ĵurnalo en la mondo (10 milionoj da ekz.). La venon de aliaj kontaktitoj malhelpis

koincida translokiĝo de Bonn al Berlino aŭ la situacio en Kosovo. Ankoraŭ ne eblas scii ĉu aperos io pri Esperanto en *Yomiuri*, des

malpli ke "japanaj amas-komunikiloj konsideras la anglan kiel internacian lingvon kaj ne havas kredon je E-o" — laŭ s-ano Miyoshi.

FINNLANDO: Inda stando

Dum la "Tagoj de la malnova literaturo" en Vammala (2-3 jul.) la standon de Esperanto-Asocio de Finnlando vizitis dekoj da interesatoj. Laŭ Jukka Laaksonen, kiu raportis en *Esperanto-lehti*, "la aranĝo estas partopreninda, kvankam eble ne ĉiujare".

JAPANIO: Ĉu efikos Berlino?

Dumviva membro kaj mecenato MIYOSHI Etsuo aktivis ankaŭ per senlaca informado. Dum la UK pasintan jaron, li informadis 50 japanajn ĵurnalistojn. (Vidu dec. '98, p. 213.) Ĉi-jare en Berlino, post preparaj kontaktoj en Japanio, li sukcesis venigi al la kongresejo lokan filiestron de *Yomi-*

FRANCIO: Efikas Montpellier'

Post la Montpeliera UK, kelkaj organizintoj plu laboris kolektante la gazetaran eĥon pri la kongreso. La kompilita dosiero tre taŭgis kiel danko-donaco al la membroj de la Honora Komitato kaj plu taŭgos por montri al interesataj ĵurnalistoj. La kompilado daŭras. (B. Flochon)



NEPALO: E-o landa lingvo?

La 21-an de jun. aperis en *The Kathmandu Post* longa opini-artikolo de Razen Manandhar, ĵurnalo kaj UEA-delegito tiufaka, kiu, kritikante la kontraŭdiversecan lingvopolitikon en sia lando, duonŝerce proponis enkondukon de Esperanto kiel landa lingvo en Nepalo. (R. Manandhar)

SVISLANDO: Multlingva tago

Interkulturan literaturan tagon pri "vivo en multlingveco" partoprenis la 5-an de sep. en sia loĝurbo Zuriko la pola E-poeto Jan Stanisław Skorupski, apud invititoj bosnia, brazila, egipta, irana k.a. Li emfazis ke kun Esperanto "ni ĉiuj estas egalaj". (*Tages-Anzeiger*)

Oficiala informilo

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Belgio: Guido Ricci. Brazilo: Neide Barros Rêgo. Hispanio: Carmen Llapart Costa. Norvegio: Trond Øgrim.

NOVJORKA OFICEJO DE UEA

Subtenanto: (min. \$25): Brazilo: C. de Moraes Lemos.

PATRONOJ DE TEJO 1999

Argentino: Rodolfo G. Calógero. Belgio: Grégoire Maertens; Stella De Weerd. Britio: Eric W. McCanlis. Francio: Nicolas Karatzaferis. Germanio: Ian C. Jackson. Nederlando: W.F. Huppertz.

SOCIETO ZAMENHOF 1999

Belgio: A. Mertens Goossens; Eliza Kehlet; Grégoire Maertens; Stella De Weerd; Jos Vandebergh. Britio: Eric W. McCanlis. Bulgario: Diana Georgieva. Danio: Peter Weide. Finnlando: Harri Tuomola; Synnöve Mynttinen. Francio: Auguste Huberdeau; Raymond Boré. Germanio: Elisabeth Hirsch; Heinrich Nischwitz; Hieronymus Stroinski; Ian C. Jackson; Judith Jackson; Patrick E. Jackson; Robin Jackson; Richard Hirsch; Oliver Walz. Hispanio: Jesús Raposo Montero. Japanio: Yoriko Itō; KIKUSIMA Kazuko (Krizantemo). Kanado: Brian D. Kaneen. Nederlando: A. J. Bakker-ten Hagen; Dini Kappert; Hans Bakker; Maud

Meijwes. Norvegio: Olav Reiersøl. Svedio: Boo Mee Kim-Lindblom; Sten Axel Broman; Roland Lindblom.

DONACOJ 1999 (EUR)

ĝis la 31-a de aŭgusto

Fondaĵo Afriko: Anonime 4537,80. Subvencio Cigno: 4039,15. Finnlando: K. Mallat 12,61. Germanio: budo dum UK 357,76. Nederlando: A. J. Bakker-ten Hagen 1361,34. Svedio: J. Hammarberg 68,28. Sumo ĉi-jara: 10 757,86.

Fondaĵo Ameriko: Argentino: Argentina E-Ligo 142,69. Brazilo: M. P. Almada 185,56. Finnlando: K. Parviala 3,20. Germanio: budo dum UK 227,17. Hispanio: L. Souto Vázquez 20,45. Japanio: A. Steffes 31,31. Usono: Somera E-Kursaro San-Francisko 372,55; M. Kazuma 14,07. Sumo ĉi-jara: 3060,17. **Fondaĵo Azio:** Japanio: M. Aihara 16,13; J. Brozovsky 16,13; S. Hayasi 32,26; N. Inaba 16,13; M. Isaki 32,26; T. Lin 81,97; M. Nakatu 32,26; M. Osioka 24,59; T. Sibaki 32,26; M. Tamura 41,48; S. Yosikawa 16,13. Turkio: S. Katircioğlu 10,66. Vjetnamio: Dạng Trần Thiêt 1,07. Sumo ĉi-jara: 1791,60.

Fondaĵo Canuto: Nederlando: A. Beuzenberg 47,65; F. D. v. Zoest 22,68. Svedio: L. Alsater 16,38; N. Pettersson 16,38; R. Moln 20,00; H. Vedin 16,38. Sumo ĉi-jara: 3779,12.

Konto Espero: Anonime 500,00. Aŭstralio: Melburna E-Societo 272,27. Belgio: H. Deceuninck 24,79. Britio: P. G. Hayward 30,42. Finnlando: K.

Mallat 12,61; S. Mynttinen 340,38; T. Sormunen 50,00. Francio: E-Kultur-Centro Tuluzo 368,93. Germanio: fam. Hirsch 25,56. Hispanio: L. E. Hernández García 52,00; R. Uruña de Hernández 51,00. Japanio: H. Akaiwa 26,96; H. Inumaru 110,30; Y. Siniciro 6,12; K. Syōzi 200,00; S. Yamato 26,96. Kanado: H. Garcia 19,70; S. Norvell 65,67; E. Vivancos 19,70. Nederlando: M. B. v. Bentum 45,38; T. v. Huis-Staritsky 45,37; F. D. v. Zoest 11,34. Svislando: D. Rooke 61,46. Usono: Ges-roj Harmon 51,13; D. Vallon Wheeler 25,56. Sumo ĉi-jara: 4313,39.

Fondaĵo Oficeja Ilaro: Italio: C. Gubbioli-Carioli 204,52. Sumo ĉi-jara: 1140,93.

Triamonda Kong. Fondaĵo: Aŭstralio: Melburna E-Societo 76,91. Finnlando: K. Mallat 23,48. Germanio: S. Cobb 15,34; T. Bormann 20,00; M. Scherm 15,34. Nederlando: T. v. Huis-Staritsky 45,38. Norvegio: K. J. Grønning 8,57. Sumo ĉi-jara: 733,35.

Volontula Fondaĵo: Finnlando: K. Mallat 16,82. Nederlando: A. Beuzenberg 45,37. Sumo ĉi-jara: 2779,61.

Kampanjo 2000: Anonime 1361,34. Britio: E. W. McCanlis 19,76. Sumo ĉi-jara: 1769,33.

Ĝenerala Kaso: Brazilo: M. P. Almada 139,17; E. kaj N. Raszl 21,78. Germanio: H. Bily 10,23; H. H. Renemann 10,23. Hispanio: C. Llapart Costa 8,72. Kanado: O. du Temple 2,63. Nederlando: F. D. v. Zoest 22,68. Sumo ĉi-jara: 3758,59.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA



GRIMLEY-MITCHELL: Geedziĝo

La konata brita aktivulo Edmund Grimley Evans (32-jara) edziĝis al Kate Mitchell la 6-an de aŭg. en la kapelo de Kolegio de Sankta Johano, Kembriĝo. "Tre malesperanta geedziĝo, ĉar mi maltrafas la UK-on!" — li komentis.



KONKURSOJ: Fiziko, fotado

Anoj de la lastaj tri klasoj mezlernejaj kaj de la unua universitata jaro estos bonvenaj la 29-31 okt. en Oradea (Rumanio), kie ankaŭ Esperanto uezblas en Konkurso Ludoviko Schwartz pri fiziko. (Temoj elektotaj el meĥaniko, termodinamiko, elektra teorio, optiko, atomfiziko.) Eblas senpaga akcepto de 15-20 konkursanoj plus iliaj instruistoj. Konkaktu: prof. István Bartos-Elekes,

JACOB: Diktaĵ-ĉampiono

Arthur Jacob, membro de la E-klubo en Kortrijk (Belgio), gajnis la Grandan Nederlandan Diktaĵon, organizitan en la Flandra Parlamentejo. (Horizontaal)


MARTINS-TUVALKINA: Jam ido

Irina Tuvalkina (23-jara, irina@ishtar.net) kaj António Martins (30-jara, toino@ishtar.net), pri kies internacia geedziĝo ni informis (majo, p. 99), gepatriĝis la 12-an de majo. Filino Marta (3036 gr, 51 cm) naskiĝis en Ĉeboksari.

MOERBEEK: 30 jarojn ĉe UEA

Festeto en la Centra Oficejo salutis la 23-an de jul. la 30-an datrevenon de Rob Moerbeek (63-jara) kiel plej longtempe deĵoranta oficisto de UEA. Ĉefa provleganto de la UEA-eldonaĵoj, li vartas ties modelan lingvaĵon, kaj krome prizorgas Bibliotekon Hodler kaj la ekspedan fakon.

Magistro Moerbeek instruis Esperanton kiel privata docento en la Universitato de Amsterdamo dum 20 jaroj ekde 1978. Li aktivis ankaŭ pri instruado



Rob Moerbeek

kaj ekzamenoj en la nederlanda movado, agadas por ne-vidantoj kaj kunorganizas Asocion de Esperantistaj Nefumantoj.

schwartz@lady.rdsor.ro. (l. Budaházy)

Post la pasintjara sukceso (40 fotoj de 15 homoj el 9 landoj), la redakcio de *La Ondo de Esperanto* kaj Urala Esperantista Societo duafoje invitas al fotokonkurso. Fotoj ne jam publikigitaj, kun ajna temo, min. 10x15 cm — maksimume 3 de unu persono, en po 1 ekzemplero, subskribitaj per pseŭdonimo kaj akompanataj de identec-indikoj en aparta koverto — atingu, antaŭ 15 dec., la adreson de *La Ondo*: RU-620077 Jekaterinburg-77, p.k. 67, Rus-



lando (hrgo@sbank.e-burg.su; [tp://www.geocities.com/Athens/Acropolis/3438/nov99-20.htm](http://www.geocities.com/Athens/Acropolis/3438/nov99-20.htm)). Povos esti premiitaj tri konkursoj, per mono kaj/aŭ abono al *La Ondo*. Krome, libroj, premioj la plej bonan bildon ligitan kun Esperanto.

KOMPOŝTO: Vizitu Esperante

Fakrevuo pri kompoŝtado, *Humus News* de la Komitato Jean Pain, uzas ankaŭ E-on. La vizitcentro de la Komitato (Hof ter Winkelen, Holle Eikstraat 25, BE-1840 Londerzeel, Belgio; [+32/52/305-365](tel:+3252305365); comite.jean.pain@skynet.be) senpage viziteblas la unuan sabaton de ĉiu monato kun gvidado, ankaŭ en E-o. (G. Pirlot)

En majo (p. 99) mi skribis, laŭ aserto trovita en la TTT-paĝoj de la gazetara agentejo České Noviny, ke "Eksa ĉeĥa ambasadoro en Aŭstralio, Jaroslav Suchánek... estis revokita de la posteno en februaro 1998 pro delikta hipotekado de la ambasada konstruaĵo." Mi sincere pardonpetas de s-ano Suchánek pro tio ke ĉi tiun nepruvitan akuzon mi prezentis sen komento, kvazaŭ fakton.

István Ertl, redaktoro

Laste aperis

KASEDO

Voĉoj el Kubo. Kantas Miriam Ramos, Beatriz Márquez, Vicente Feliú. [Havano]: Heliko (KEA), 1999. 55 min. Flanko A: radio-elsendoj pri diversaj facetoj de Kubo; flanko B: 9 famaj kubaj kantoj. € 9,00.

KOMPAKTAJ DISKOJ

Hungara-Esperanta vortaro. Kun esperantaĵoj. István Szerdahelyi (1924-87), Ilona Koutny (1953). La diskon kompilis Gábor Deák Jahn k.a. Budapeŝto: Hungaria E-Asocio, 1999. La kompleta materialo de granda vortaro (vidu jul.-aŭg., p. 134) kun serĉfunkcio, plus diversaj E-lingvaj dokumentoj. € 24,00.

Mainzer Figuralchor. H. Schütz, J. Ch.

Bach, J. S. Bach, J. M. Bach, J. Bach, F. Mendelssohn-Bartholdy, Franz-Georg Rössler. Direktisto: Stefan Weiler. Cologne: Valve-Hearts, 1996. 76 min. Kantata germane, krom la E-lingva *Evoluo* de Rössler (11 min., teksto de Rikardo Ŝulco), nur-voĉa verko por gea ĥoro. € 24,00.

Masko. Kajto (Nanne Kalma, Marita Kruijswijk, Ankie van der Meer, Marian Nesse). Donneville: Vinilkosmo, 1999. 28 min. Kolekto 2000. Dek kantoj en la tipa popolmuzika etoso de Kajto. Tekstoj de N. Kalma, M. Redoulez, P. Thorsen, S. Trenner. € 15,00.

Ŝako. A. Cossavella (voĉo, akustika gitaro), P. Ciancio (drumo), S. Agustoni (basgitaro), I. Mendizábal (gitaro). Donneville: Vinilkosmo, 1999. 25 min. Kolekto 2000. La argentina rok-grupo Porkoj kun A. Cossavella, gajninto en Belartaj Konkursoj, ludas vigan rokon kaj melankolian bluson. € 15,00.

VIDBENDO

83a Universala Kongreso de Esperanto, Montpeliero 1998. Kongresa filmo (ne oficiala). Lausanne: Nandir Filmoj, 1999. 25 min. PAL, NTSC. Bunta kalejdoskopio de plej diversaj programeroj. € 29,95.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA,

Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 2,25 eŭroj. Antaŭdankon pro via mendo!

Arthur G. CHATTERTON (1910-1999) mortis la 19-an de majo en Hobart (Aŭstralio). Iama (1944-56) sekretario de Tasmana E-Asocio, li estis la plej maljuna esperantisto en Tasmanio.

Peter CMARKO (1951-1997), dumviva membro en Bratislava (Slovakio), forpasis la 18-an de julio 1997.

Hendrika KVIST-WELLER (1916-1999) forpasis la 10-an de aŭgusto en Højbjerg ĉe Århus (Danio). Nederlandanino, ŝi eklernis E-on en 1931 kaj ekloĝis en 1953 en Danio kun sia edzo Viktor Kvist. Ŝi prezidis la E-klubojn en Åbyhøj (ĝis 1991) kaj de Århus (1994).

André MARTINET (1908-1999), fama franca lingvisto, mortis la 16-an de julio. En venonta numero ni artikole adiaŭos lin.

Johann RIEDL (1913-1999), iama delegito en Esslingen (Germanio), forpasis lastatempe.

Ĥristo GOROV (1908-1999), pli ol 70 jarojn aktiva esperantisto, estis deklarita Honora Membro de UEA en la Berlina UK, antaŭ ol venis informo pri lia forpaso nurajn 4 tagojn pli frue, la 28-an de julio en Sofio (Bulgario).

Gorov naskiĝis la 18-an de julio 1908 en Gorni Brodi (nun en Greklando). Kiel juna laboristo avide kleriganta sin, li lernis E-on kaj rapide manifestis literaturan talenton, kiun Internacia Asocio de Revoluciaj E-Verkistoj rekonis per sia membreco. Li aŭtoris sub la pseŭdonimo Ĥrima la poemaron *Poemo de l' plugisto* (1930), la ra-

Barbara CVETKOVA

(1910-1999), Honora Membro de UEA ekde 1995, dojeno de la ruslanda Esperanto-movado, forpasis la 13-an de aŭgusto en Peterburgo, kie ŝi naskiĝis la 4-an de majo 1910.

Esperantisto ekde 1928, ŝi korespondadis kun eks-terlandanoj ĝis la Stalina malpermeso. Post jardekoj da deviga pasiveco, ŝi sukcesis partopreni la Vienen UK (1970) dank' al invito de ŝia unua



Arkivo de UEA

Barbara" (kun la filino Valeria) gvidis en Leningrado/Peterburgo ekskursojn, akceptis gastojn kaj ĉiel helpis esperantistojn el aliaj urboj.

Vladimir SILJANOVSKI (1936-1999), kursgvidinto, E-populariginto en Skopje (Makedonio), iama delegito pri stomatologio, mortis la 14-an de aprilo.

Elvira TAPIA BATISTA (1931-1999), delegitino en Holguín (Kubo) kaj fakdelegito pri biologio, E-instruinto, forpasis la 8-an de majo.

YAO Xueyin, 89-jara ĉina verkisto, mortis la 29-an de aprilo. De 1981 membro de la societo "Amikoj de Esperanto" (kuniganta prestiĝajn subtenantojn kiel la verkistoj Bakin kaj Ĵelezo), li eklernis la Internacian Lingvon en 1935 kaj verkis en 1937 la artikolon "Esperanto ne estas fremdlingvo".

kontaron *Ĉe abismo* (1931) kaj la novelon *Du frontoj* (1932). Li fondis kaj redaktis sekretan stencil-gazeton laboristan, *Sturmulo*, kaj estis en 1935 malliberigita por pli ol du jaroj pro laborista E-agado. Kontraŭfaŝisma partizano en la dua mondmilito, en la posta komunisma reĝimo li laboris en la partia aparato, ĉe ties Centra Komitato kaj ĉe la Ministra Konsilantaro.

Dum jardekoj Gorov estis membro de la centra estraro de Bulgara E-Asocio kaj ĝia plej longdaŭra prezidanto (1960-64 kaj 1976-87). Sub lia gvidado BEA gajnis la Trofeon Fyne de UEA en 1987. Li longe servis kiel

komitatano de UEA (1977-89), estrarano de Mondpaca E-ista Movado kaj de pluraj aliaj E-organizaĵoj. Li kunarangis la UK-ojn en Sofio (1963) kaj Varna (1978) kaj IFEF-kongresojn en Varna (1967) kaj Slanĉev Brjag (1984). En 1983 aperis lia poemaro *Ribela kordo*; en 1986 lia originala proza verkaro, *Mia verda pado*. Li sisteme iniciatis la eldonadon de tradukoj el la bulgara, redaktis kaj kompilis multajn el ili, kiel *Septembra poezio* (1982), *Bulgara nuntempa poezio kaj prozo* (1985) kaj *Bukedo* (1985). Ankaŭ en la bulgara li verkis, ne malpli ol 13 librojn.

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto (eksteraj rilatoj, kunordigo): S-ro Kep Enderby, 2 Phoebe Street, Balmain, Sydney 2041 NSW, Aŭstralio; ☎ +61-2-9810-4227; ✉ +61-2-9555-9705; ☐ kependerby@bigpond.com.

Vicprezidanto (Kampanjo 2000, landa agado, financo): d-ro Renato Corsetti, Colle Rasto,

IT-00036 Palestrina, Italio; ☎ +39-06-957-57-13; ✉ +39-06-957-66-33; ☐ corsetti@itc.it.

Ĝenerala Sekretario: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎ +39-06-39-72-61-98; ✉ +39-06-39-72-61-69; ☐ lipari@esperanto.nu.

Estrarano (faka kaj scienca agado, edukado): d-ro Petro Chrdle, Anglická 878, CZ-252 29 Dobřichovice, Ĉeĥio; ☎ +420-2-991-2201; ✉ +420-2-991-2126; ☐ chrdle@telecom.cz.

Estrarano (Afrika agado): s-ro Gbeglo Koffi, B.P. 13169, Nyekonakpoe, Lomé, Togolando; ☎ +228-27-21-17.

Estrarano (kulturo kaj landa agado): s-ro Tacuo Huĝimoto, Kubota 31, Sakio-ku, Kyōto, 606-8266, Japanio; ☎/✉ +81-75-711-45-58; ☐ jasu-k@mac.email.ne.jp.

Estrarano (informado): s-ro Kalle Kniivilä, Skyttelinjen 55, SE-226 49 Lund, Svedio; ☎ +46-70-636-93-78; ☐ Kalle.Kniivila@sydsvenskan.se.

NOVAĴOJ

de la eldona fako
de UEA


OMAĜE AL AULD KAJ BOULTON

**LINGVA ARTO. JUBILEA LIBRO OMAĜE AL
WILLIAM AULD KAJ MARJORIE BOULTON.**

**Red. Vilmos Benczik. Rotterdam: UEA, 1999.
ISBN 92-9017-064-6. 5+217p. 21cm. Prezo: € 16,50.**

En 1999 William Auld kaj Marjorie Boulton festas sian 75-an datrevenon. Okaze de la jubileo UEA donacis al ili festlibron, en kiu pluraj kontribuantoj prilumas ilian verkistan karieron kaj analizas iliajn verkojn. Aliaj eseoj traktas aktualajn temojn de la movada kaj kultura vivo de Esperantujo.

Kontribuis V. Benczik, G. Berveling, W. Bormann, J. Camacho, P. Daŝgupto, S. Fiedler, P. Gubbins, T. Huĝimoto, R. Jaderstrom, E. de Kock, A. Korĵenkov, Laŭlum, Mao Zifu, G. Mattos, S. Maul, A. Montagut, S. Pokrovskij, B. Ragnarsson, M. de Seabra, G. Silber, H. Tonkin, L. Trifončovski kaj J. Wells. Kun la bibliografioj de Auld kaj Boulton fare de C. Cimpa.



FILMO PRI VIVANTA LINGVO




ESPERANTO BUNTE VIVAS. Vidbendo. Foris Productions. Rotterdam: UEA, 1999. VHS/PAL. 28 min. Prezo: € 24,60.

Esperanto-versio de la filmo pri la Montpeliera UK, kies franca originalo estis celita al ne-esperantista publiko. Intervjuoj kun gekongresanoj kaj scenoj el la programo de la UK bildigas la tutmondecon de la vivanta lingvo Esperanto.

PRAGA MANIFESTO PROFUNDE

KIO NI ESTAS KAJ KION NI CELAS. Red. O. Buller kaj R. Corsetti. Rotterdam: UEA, 1999. ISBN 92 9017 061 1. 24p. 30cm. Prezo: € 5,50.

Studkajero pri la temoj de la Manifesto de Prago: demokratio, transnacia edukado, pedagogia efikeco de Esperanto, plurlingveco, lingvaj rajtoj, lingva diverseco kaj homa emancipiĝo.



KAJ PLIE...

INTERNACIA KONGRESA UNIVERSITATO 1999. Red. M. Lipari. Plena prelegaro de IKU en la Berlina UK. 81p. 30cm. Prezo: € 7,80.

ĈIUJ KUNE. Aktoj de la 1-a kunsido de la Strategia Forumo de la Esperanto-komunumo, Montpeliero 1998. 20p. 21cm. Prezo: € 2,15.

SPIRITO DE ESPERANTO KAJ LA "SAMIDEANAJ" MALAMIKAĴOJ. Ignat Bociort. Premiita eseo. 12p. 21cm. Prezo: € 1,50.

TRIONA RABATO EKDE 3 EKZ. DE SAMA TITOLO ĈE LA LIBROSERVO DE UEA.

Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando

Telefono: +31 10 436 1044

Telefakso: +31 10 436 1751

Retpoŝto: <uea@inter.nl.net>

LA ONDO DE ESPERANTO


Ĉiumonata soci-kultura revuo kun literatura suplemento jarfine

- ☐ Tra Esperantujo: Faktoj, problemoj, komentarioj
- ☐ Tiel ni vivas: Raportoj el la postkomunisma mondo
- ☐ Civilizo: Kia estis, estas kaj estos la mondo?
- ☐ Esperanto: lingvo, komunumo, kulturo
- ☐ Noveloj kaj poemoj, originalaj kaj tradukitaj
- ☐ Mozaiko: konkursoj, kvizoj, krucvortenigmoj, humuro

Abonebla kontraŭ 22 eŭroj ĉe UEA kaj landaj perantoj
Provezemplero ĉe RU-620077 Jekaterinburg-77, pk 67, Ruslando

GVIDILO PRI HOMAJ RAJTOJ

Okaze de la 50-a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj UEA eldonis tiun ĉi lernolibron de Unesko pri homaj rajtoj, aperintan antaŭe jam en 16 aliaj lingvoj. Leah Levin estas brita fakulo pri homaj rajtoj. La unua parto de ŝia libro priskribas la internacian juron pri homaj rajtoj, kun multa atento al la evoluo de la proceduroj por protekti homajn rajtojn kaj al la hom-rajta edukado. La dua parto klarigas la enhavon kaj signifon de ĉiu artikolo de la Universala Deklaracio. La modele tradukita kaj bele eldonita libro estas ilustrita de Plantu, fama franca karikaturisto.



HOMAJ RAJTOJ: DEMANDOJ KAJ RESPONDOJ. Leah Levin. Ilus. Plantu. El la angla trad. Edmund Grimley Evans. Rotterdam: UEA, 1998. 140p. ISBN 92 9017 058 1. 21cm. Prezo: € 10,90.



LA RADIKOJ DE EVOLUO



La kulturo de ĉiu popolo estas intime ligita al ĝia evoluo. Lastatempe tiu ligo rompiĝis, precipe en evolulandoj, pro adopto de la okcidenta evolumodelo kaj internaciigo de la okcidenta evolumodelo. La aŭtoro de tiu ĉi Unesko-studo – klerulo kaj eksdiplomato el Trinidado kaj Tobago – tamen montras kiel ankaŭ nun eblas utiligi la tradiciojn de la popolo por ĝia evoluo.


“Evoluo povas prosperi nur se ĝi havas radikojn en la kulturo kaj tradicio de la koncerna lando.” (p. 15)

KULTURO KAJ EVOLUO. Mervyn Claxton. El la angla trad. Johano Rapley. Rotterdam: UEA, 1998. 60p. ISBN 92 9017 059 X. 21cm. Prezo: € 6,80.

Jen la plej

vaste legata junulara gazeto
rekomendinda por komencantoj
diversa kaj amuza
interesa por ĉiuj

KSTAKTO estas gazeto por ĉiu kiu serĉas interesan legaĵon en Esperanto. Ĉiu numero havas ankaŭ tekstojn en tre facila lingvo, tiel ke **KSTAKTO** estas aparte taŭga por komencantoj kaj por Esperanto-kursoj. Krome, konkurso atendas vin en ĉiu numero de la revuo! En 1999 **KSTAKTO** aperos 6-foje. Abonu rekte de UEA aŭ ĉe via kotizperanto.




ABONTARIFO 1999

Aŭstralio	31 dolaroj	Francio	120 frankoj	Nederlando	40 guldenoj
Aŭstrio	250 ŝilingoj	Germanio	36 markoj	Norvegio	150 kronoj
Belgio	740 frankoj	Hispanio	2400 pesetoj	Pollando	20 guldenoj
Brazilo	20 guldenoj	Israelo	31 guldenoj	Portugallio	2500 eskudoj
Britio	15 pundoj	Italio	33000 liroj	Svedio	165 kronoj
Danio	135 kronoj	Japanio	2600 enoj	Svislando	28 frankoj
Finnlando	110 markoj	Kanado	29 dolaroj	Usono	22 dolaroj

**Granda rabato por grupaj abonoj
ekde ses ekzempleroj. Informiĝu!**

Tuta biblioteko en unu libro!



El ĉiuj aperintaj volumoj en la Jubilea Kolekto de UEA, tiu ĉi – la kvina – plej bone prezentas la tutan lingvon, ĝiajn varion kaj fascinan.

Nova Esperanta Krestomatio

Redaktis William Auld.

509 p. Tole bindita kun kromkovrilo.
€ 19,05; nur € 12,70 ekde 3 ekzempleroj.